der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

23. Jahrgang Nr. 142 (2/1987) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Humphrey Tonkin

Paco estas pli ol manko de milito

Per rezolucio de la 24a de oktobro 1985, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj solene deklaris la jaron 1986 la Internacia Jaro de la Paco. Ĝi krome atentigis, ke la popoloj devas „vivi kune en paco kaj praktiki toleremon". Estas konate, ĝi aldonis, ke „edukado, informado, scienco kaj kulturo povas kontribui al tiu celo".

Unu monaton pli poste, la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion, kiu rekonis la Jubileon de la Internacia Lingvo Esperanto en 1987. Ĝi petis la Ĝeneralan Direktoron de Unesko sekvi la laboron por Esperanto, ĝi alvokis al utiligo de Esperanto flanke de internaciaj organizaĵoj, kaj ĝi rekomendis, ke tutmonde oni enkonduku en la lernejojn studadon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto.

Sekvante la rekomendojn de Unuiĝintaj Nacioj, kaj konsciante pri la decido de Unesko, Universala Esperanto-Asocio elektis kiel ĉi-jaran temon de sia Kongreso la temon „Interkompreniĝo, paco, evoluo".

Tiu temo tre klare implicas, ke paco estas pli ol manko de milito. Pro konstrui la pacon, necesas pozitiva agado — agado, en kiu oni celu krei toleremon inter la homoj, subteni kunlaboron kaj konstrui la instrumentojn kaj instituciojn de la paco.

La kreinto de Esperanto komprenis tion. Zamenhof skribis, en nia konata himno, pri „nova sento". Ni ofte kantas tiujn vortojn, sed ĉu ni vere komprenas la signifon de tiu nova sento? Zamenhof kreis per Esperanto miraklan internacian lingvon, kiu brile funkcias — kiel ni klare vidas ĉi tie, kie ĉino kompreniĝas kun germano, brazilano kun japano, kanadano kun iranano. Temas pri kompreniĝo, kiu jam preskaŭ cent jarojn mirigas la utiligantojn de nia facila, fleksebla, esprimiva lingvo.

Sed per la vortoj „nova sento" Zamenhof celis lingvon ne nur de la lango sed ankaŭ de la koro, ne nur de la korpo sed ankaŭ de la animo. La arkitektoj de la tutmonda paco, ĉu esperantistoj ĉu neesperantistaj, insistas, ke necesas ŝanĝi la pensmanieron de la homoj por krei veran pacon. Tion ni parolantaj de Esperanto komprenas. Ni jam praktikas tiun „novan senton" — senton, kiu kapablas forigi la miljarajn murojn inter la popoloj.

Pro tio, en nia kongresa temo, ni aldonis al „paco" ankaŭ la vorton „interkompreniĝo". Fakte, ni metis interkompreniĝon en unuan lokon, ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo de la vera paco.

Ni kongresas ĉi-jare en la plej granda lando de la mondo: unu kvarono de la monda loĝantaro estas ĉina. Ĉinio ba-

Edmond Privat

Esprimo de sentoj en Esperanto II

La unua parto aperis en „der esperantist" 1/1987)

6. Logiko kaj sento

Esprimo de „nuancoj". Logikaj distingoj. Sentaj distingoj. Sama listo de rimedoj. Insisto. Ĉu. Vera kaj falsa demando. Ne. Mallogika uzo de la neo kaj malo. Ironio. Kontrolo de la kompreno. Telefona stilo. Bildoj. Propraj kaj internaciaj. Du roloj du sufiksoj. Komparo de la rimedoj en Esperanto kaj aliaj lingvoj.

En antaŭa ĉapitro ni donis liston de diversaj rimedoj uzataj (plej ofte senkonscie) por esprimi sentojn. Nu, tiuj samaj rimedoj povus esti ankaŭ uzataj por esprimi logikan ideon. Fakte ĉiu ajn lingva rimedo povas servi al unu aŭ la alia kaj plej ofte al ambaŭ samtempe. Estas afero de grado.

Ni reprenu la kvar aŭ kvin notitajn rimedklasojn, unue la nerektajn:

1e: Sona plilaŭtigo de iu aŭ alia frazero.

Jen senkolora frazo: „Li venis je la oka." Diru nun kun forta akcento: „Je la oka li venis" (ne je la naŭa). Tiu plilaŭtigo certe montras logikan distingon kaj insiston pri akurata fakto. Se vi diras nun „Je la oka? Vi frenezas. Mi bezonas ripozi dimanĉon matene." Tiam vi sentas evidente kaj aŭdeble indignon, ke oni kuraĝas proponi al vi tiel frumatenan inviton aŭ ordonon. Tie estas ne nur plilaŭtigo, sed vere alitonigo, kiu transformas la frazon kvazaŭ en demandon, duone indignan, duone mokan. En simpla ordono kiel „Venu je la oka, ne je la naŭa" diferenco en la tono aŭdigus, ĉu temas nur

---

raktas kun grandaj problemoj: problemoj de kreskanta nombro de loĝantaro, problemoj de tekniko, problemoj de organizado. Kaj iom post iom ĝi venkas tiujn problemojn. Ĝi estas vere evoluanta lando. La kongresanoj de la 71-a Universala Kongreso spertas deproksime la problemojn kaj la paradoksojn, la esperojn kaj eltrovojn de tiu ĉi lando en stato de evoluo.

La tria elemento en nia kongresa temo estas ĝuste „evoluo". Per nia temo ni sugestas, ke, same kiel paco dependas de interkompreniĝo, tiel ankaŭ evoluo dependas de ambaŭ tiuj elementoj.

La ĉina estas antikva civilizo: ĝiaj kulturaj radikoj penetras profunden en la ĉina tero kaj ĝiaj kulturaj atingoj mirigas la tutan mondon multajn jarcentojn. Necesas samtempe konservi tiun kulturan tradicion kaj modernigi ĝin. Tio estas ebla nur en pacaj cirkonstancoj, nur en spirito de interkompreniĝo. Kio validas por Ĉinio, validas ankaŭ por la tuta mondo: nur en paco, nur en spirito de kompreno, ni povas forigi la militon. Milito estas hodiaŭa realo en multaj landoj. Nur en reciproka respekto ni povos forigi la problemon de rifuĝintoj, nutri la malsatantojn, klerigi la neklerajn, kuraci tiujn, kiuj malsanas. Nur en interkompreniĝo ni povos krei mondon, en kiu regas nova sento, nova spirito de kunlaboro, tolero kaj egala disdivido de la riĉaĵoj de nia mirakla planedo.

La Internacia Lingvo Esperanto, karaj gekolegoj, donas eblecon atingi tiun tutmondan interkompreniĝon, pri kiu aludas nia kongresa temo. Ĝi estas fundamenta elemento en la paco. Ĝi estas utila ilo en la homa kaj ekonomia evoluo, ĉar ĝi kreas reciprokan respekton inter la popoloj kaj kulturoj, kaj ĝi ebligas senperan komunikadon en spirito de egaleco inter la homoj. En Esperanto, neniu kulturo subpremas alian kulturon, neniu homo superas alian: ni laboras sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian. Interkompreniĝo, paco, evoluo! Je la sojlo de la Jubileo de Esperanto, ni salutas la evoluantan novan Ĉinion, ni salutas la arkitektojn de la paco tra la tuta terglobo, kaj ni salutas la parolantojn de la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj faras sian kontribuon al kreo de paca mondo, al kreo de nova sento inter la popoloj.

[Parolado dum la inaŭguro de la 71-a UK en Pekino 1986]

pri logika aŭ krome pri avertriproĉa insisto.

2e: Ŝanĝo en la ordo de la frazo.

Se vi diras „Vi aĉetu tian skatolon, ne alispecan", la plilaŭtigo jam efikas. Tamen, same kiel en la ĉi supra ekzemplo, la ŝanĝo de la ordo en la frazo ankoraŭ pli impresas: „Tian skatolon, vi aĉetu, ne alispecan". Tie temas certe pri teknika ordono, do insisto kun senco ĉefe logika. Sed se vi, reveninte, aŭdas la komisianton ekkrii „Tian skatolon vi kuraĝis aĉeti!" Tiam certe vi tuj komprenas lian senton pri miro kaj malkontenteco, esprimitan per la frazaranĝo kaj plilaŭtigo samtempe.

Sub tiu ĉi sama kategorio rimarku la uzon de demanda aŭ nea formoj. La logika uzo de **ĉu** estas ja la demanda, kiel en la tipa „Ĉu vi venos aŭ ne?", sed en „Ĉu vi povis tiel agi?" la logiko jam preskaŭ malaperis kaj la sento regas. Temas ne pri demando, ĉar oni jus konstatis, ke vi agis tiel kaj do ja povis agi tiel, sed la demanda ordo tie montras miron, surprizon, eble ĉagrenon. Tamen en Esperanto la vorto **ĉu** estas tiel forte logika en la uzado, ke ĝenerale tiuj falsaj demandoj kun senta esprimeco konsistas pli ofte en ordoŝanĝo en la frazo sen **ĉu**.

Vidu ekzemple: „Eliri nokte sen lumo? Koran dankon, mi preferas atendi hejme."

Mallogika uzo de la neo kun senta forto estas konata en ironio aŭ en plendo. Malriĉaj laboristoj okupantoj je iu riparo en palaco de milionulo babilas inter si laborante, dum la mastrino ankoraŭ dormas aŭ legas en lito supre: „La malfeliĉulino neniam havas libertempon, ne havas por manĝi, nek por trinki, nenion en la kelo, nenion en la banko . . .!"

Rimarkinde tia uzo ne tre okazas en Esperanto, dum ĝi estas oftaĵo en multaj lingvoj. Kial? Ĉar ironio estas unu el la malplej internaciaj aferoj. Ŝerco, kiu ridigas en unu lando, tute ne efikas en alia pro malsimileco de kutimoj.

Tiam la ĉion reganta sankcio de la kompreno aŭ nekompreno malkuraĝigas kaj maloftigas en internacia lingvo tro riskajn aŭ malprudentajn esprimojn sur tiu kampo. Atentinda fenomeno.

3e: Forigo aŭ ripeto de vortoj.

Ni prenu la unuan disponeblan rimedon, la forigon de vortoj: „Skatolon? Ne. Keston prefere!" Jen kvazaŭ telefona interparolo. Ĉiuj verboj, pronomoj ktp. mankas. Tie la forigo de vortoj antaŭ ĉio helpas logikon. La celo estas precizigo teknika. Sed aŭdu alian telefonan interparolon: „Min, prezidanto? Neniam!" Tie la forigo de vortoj havas akre sentan signifon kaj vi tuj komprenas kun kia malplezuro la parolanto sin defendas kontraŭ nedezirata elekto. Nun revenu al la rektaj rimedoj, elĉerpeblaj el la vortoj mem:

4e: Elekto inter ekzistantaj vortoj.

Elektu ekzemple la vortojn **paroli kaj bleki.** Jen tute logika uzo de ĝi: „Homoj parolas, bestoj blekas." Tio estas scienca konstato. Se vi nun ekkrias en diskuto: „Neeble interparoli! Vi nur blekas kaj insultas!" Tiam certe la elekto de la vorto **blekas** havas malpli logikan intencon ol nereteneblan sentan signifon. Sub tiu ĉi kategorio vi povas ekzameni ĉiujn bildojn uzatajn en la lingvo. Ju pli nelogikaj, eĉ mallogikaj ili ŝajnas, des pli forta estas la sento esprimata.

Por kompreni, kial vi jus povis nomi **elefanto** vian ĉarman delikatan filineton, necesas ekscii, ke ŝi renversis tason da teo kaj marŝis sur vian plej belan silkan robon! Tiam oni ekkompatas vian senton, forte esprimitan.

Esperanto elĉerpas siajn bildojn el tri ĉefaj fontoj: propraj-komunaj, propraj-personaj kaj eksteraj-tradukitaj. Tiu ĉi lasta klaso ekzistas en ĉiuj lingvoj, kiuj konstante pruntas unu al alia, ĉar la homoj havas ĉie similajn emojn. Do en Esperanto, kiel en plej multaj aliaj lingvoj, oni diras „forta kiel leono", nomas malican knabon „diableto" aŭ priskribas malbonan junulon kiel „sentaŭgulon". Tiu ĉi lasta vorto estas internacia kopiaĵo tipa kun laŭvortaj egalaĵoj en preskaŭ ĉiuj lingvoj (france: **propre á rien aŭ vaurien,** angle: **good for nothing** ktp.).

Sed ĉiu Esperanto-parolanto kreas proprajn bildojn laŭbezone aŭ ripetas tiujn aŭditajn de ceteraj homoj, do la lingvo posedas jam sian apartan materialon tiurilate kaj riĉigas ĝin per uzado. Cetere kategorioj estas tie ne-

niel solidaj. Ĉu la uzo de „bleki", ĉi supre notita, estas propra aŭ kopiita? Ĉiuokaze ĝi respondas al nepra senta bezono, kaj la uzantoj, kiuj ĝin ripetas en simila okazo, plej ofte ne pensas al sia propra gepatra lingvo.

5e: Kreo aŭ modifo de vortoj.

Sub tiu kategorio de rimedoj envenas la riĉa produktado per vortkombinoj kaj ĉefe per prefiksoj kaj sufiksoj.

Ilian uzon por logikaj celoj instruas ĉiu gramatiko. Se vin informas kompetentuloj, ke „la fosistoj malkovris romanan vazegon malfacile transporteblan", vi ja ne aŭdas el la uzitaj sufiksoj ion alian ol pure logikan, sed se vi priskribas iun kiel „Azenego! Neaŭskultebla ulo!" vi certe montros nek admiran, nek ŝatan senton al tiu malplaĉanto kaj oni povos konstati, ke vi uzis la sufiksojn malpli logike ol subjektive.

Nu, se vi komparas diversajn naciajn lingvojn kun Esperanto rilate al tiuj kvinspecaj disponeblaj esprim-rimedoj, vi povos iel mezuri ilian relativan riĉecon en viveco kaj trafeco.

Rigardu la nerektajn rimedojn denove: Sub paragrafo unua (alilaŭtigo sona) la kapablecoj estas pli malpli egalaj.

Oni disponas tiun eblecon sufiĉe abunde.

Sub klaso dua (aliordigo en la frazo) Esperanto havas ian avantaĝon pro sia granda libereco tiurilate. Ĉar en ĝi la ordo de vortoj ne havas fiksan logikan rolon, tiu rimedo disponiĝas libere por insistaj celoj aŭ sentesprimaj bezonoj.

Ĉe la tria rimedspeco (ripeto, forigo) la kapablecoj estas denove pli malpli egalaj kaj tiun rimedon konas ŝajne ĉiuj lingvoj.

Nun atentu ree pri la rektaj rimedoj: La kvaran (elekton inter sinonimoj) la malnovaj lingvoj posedas pli riĉe ol Esperanto havante pli vastan kvanton da radikvortoj en sia disponbla materialo.

Male sub paragrafo kvina (kreo kaj modifo de vortoj) Esperanto disponas preskaŭ senliman fonton kaj vivan riĉecon ĉiam malfermitan, kiu mankas al fiksitaj lingvoj.

Tio ĉi estas ĝia eco plej tipa kaj meritas apartan ĉapitron.

7. Diversaj roloj de afiksoj

Unueco de senco. Varieco de roloj. Mal-. Mortinta kaj vivanta. Influo de la uzofteco. Kelkaj sufiksoj. Tri gradoj de stato. Vortara enkorpiĝo kaj senca limigo. Fiksitaj blokoj. Plena forto nur logika. Spica valoro senta. Dependo de l'uzofteco. La leĝo de Meillet. Eluzo. Sindefendo de la lingvo kontraŭ eluzo. Emo al novaj formoj. Malfortiĝo pro kutimo. Frapeco per eksterkutimeco.

Afiksoj en Esperanto konservas unuecon de senco, sed ilia praktika rolo varias en diversaj okazoj. Ilin observante en la vivo lingva oni povos ekkoni ilian espriman valoron kaj eĉ mezuri gradojn.

Rigardu **mal-** ekzemple. En la vorto **malgranda** ĝia valoro estas nur etimologia aŭ memorhelpa. Fluaj uzantoj de la lingvoj jam delonge ne plu pensas pri la malo de **granda**. Ili kutimas senkonscie uzi unupense kaj unuparole **malgranda** same kiel france **petit**, germane **klein** aŭ angle **small**. Tie la rolo limiĝas al faciligo por lernantoj de la lingvo.

Se vi diras **malsimpla**, tiam la penso videble intervenas por serĉi kaj montri la malon de **simpla** kreante sinonimon al **komplika**. En tiu okazo la rolo de **mal-** estas ankoraŭ viva logika senctransformo.

Nun sonos al viaj oreloj la jena frazo: „Kiam li ricevis, kiel solan dankon, tiun efektivan **malsalajron**, li kompreneble **malridis**." Tiam certe la penso de la parolanto kaptis **mal-** por ĝin utiligi kiel esprimilon de sento pli ol de logiko.

Se vi serĉos kaj enklasigos grandan kvanton da tiuj ekzemploj, vi baldaŭ trovos mem la kondiĉojn de tiuj diversaj gradoj. Ili ĉefe dependas de la ofteco. **Malgranda** estas uzata tiom da milionfojoj kiom **granda** kaj fariĝis unu el la plej kutimaj vortoj de la lingvo. Por esprimi forte la senton pri malgrandeco necesas nun uzi eta, ĉar malpli eluzita. **Malsimpla** estas jam multe pli malofta ol **malgranda**, sed **malridi** aŭ **malsalajro** estas tiel maloftaj, ke ili frapas. Ĝuste tiun frapecon pro malofteco la forta sento uzas por esprimiĝi kaj impresi la aŭdanton.

Similan observon oni povas fari pri multaj afiksoj en la lingvo, ĉefe sufiksoj. Ekzamenu laŭgrade:

mirinda	leginda	rigardinda
Esperantisto	Einstein-isto	frazisto
timema	kantema	frazema
ĉambrego	ĝardenego	tagmanĝego
beleta	liteto	sinjoreto
rideti	dormeti	rigardeti
tranĉilo	manĝilo	sukcesilo

En vortoj de la unua kolono (mirinda, beleta, tranĉilo ktp.) la sufikso tiom „mortis" aŭ enkorpiĝis, ke ĉiuj vortoj de tiu klaso jam akiris apartan sencon kiel etiketo de unu ideo speciala (aŭ nomo de unu aparta objekto). Ili ne plu kovras la tutan logikan kampon regatan de la sufikso. Ekzemple **tranĉilo** ne signifas ĉian eblan ilon por tranĉi, sed nur unu specialan tre komunan specon. **Ĉambrego** havas jam propran apartan sencon de loko, kie oni povas organizi kunvenon aŭ paroladon. **Rideti** ne signifas etan ridon, sed alian multe pli afablan lumiĝon de la vizaĝo. Tiuj vortoj fariĝis tutoj kun fiksa bloka senco. La rolo de la sufikso reduktiĝis al nura memorhelpilo en lernado de vortoj.

Tiuj de la dua kolono konservas la vivan uzon de la sufikso, aldonebla al radiko kun plena logika forto (leg'inda, kant'ema, dorm'eti).

Sed la vortoj de la tria kolono montras eĉ ankoraŭ pli vivan uzon de la sufikso kun spica valoro senta. En ili suferas iom la logiko, sed impresas la kontenteco de l' knabeto pri „tagmanĝego" (kiu eble tute ne estus ega por vi, sed ŝajnis al li tia) aŭ la moko de l' kritikanto pri la „frazisto", kiu uzis flatan paroladon kiel „sukcesilon" por akiri postenon.

Nu, tiuj tri kolonoj ankaŭ korespondas al gradoj de uzofteco. Por la unua la uzofteco estas tiel granda, ke la sufikso perdis tie sian apartan vivon kaj enkorpiĝis aŭ „mortis". Por la dua, la uzofteco estas malpli granda kaj oni sentas ankoraŭ la pensan intervenon por formi la vorton kun intenco logika. Por la tria la uzo estas escepta, malofta. Pro tio ĝi frapas kaj taŭgas por esprimi senton.

Tiuj ekzemploj konfirmas la konatan lingvosciencan leĝon de Meillet, asertantan, ke ĉiufoje, kiam lingvero estas parolata, ĝi perdas iom de sia esprima potenco.

Estas interesa kaj eĉ admirinda fenomeno, kiamaniere lingvoj reagas kontraŭ tiu konstanta perdado, trovante ĉiam novajn rimedojn por re-naĝi kontraŭ la fluo. Vidu Esperanton mem. La sufikso **eg'** estas vivoplena, tiel sangoriĉa, ke ni ĉiuj emas ĝin uzadi ofte kaj oftege por kontentigi nian naturan bezonon al trograndigo. Italoj uzas **-issimo.** Nu, en vortoj kiel **ĉambrego, pordego, belega** ĝi jam mortis. Ĝi kunlaboris por krei tiujn fiksajn etiketojn, seg ĝi peris ĉiun sendependan forton por surrajdi, sproni kaj influi la radikon. Do kiel fari, se ni bezonas esprimi nian pasion por grandigo rilate al **ĉambro, pordo** aŭ **bela**? Nu la lingvo neniam estas embarasata. Tiam la ŝatata sufikso, trovante la pordon fermitan, eniras tra la fenestro. Ĝi alivestiĝas kiel adjektivo aŭ adverbo kaj, antaŭ ol vi havis tempon tion konstati, vi jam ekkiris **ega ĉambro, ega pordo** aŭ **ega bela.** Tie la sento kaj vivo forte korbatas. **Eg',** nia karulo ĉiuminuta, ne konsentas morti, eĉ ne ripozi. Tro sangoplena ĝi estas.

Similon ni jam rimarkis pri **et'** en parenca okazo. Perdinte forton en tro uzita **dometo,** ĝi retrovas ĝin en **eta domo.** Vidu kiel **kantema, parolema, plorema** jam ricevis per uzo veston de ĝenerala kutimo. Ili jam etiketas konstantajn kvalitojn aŭ malkvalitojn. Se io subite okazis al vi kaj vi sentas boli en vi mem la deziron aŭ bezonon kanti, aŭ plori, aŭ paroli, vi ja ne diros: **mi**

estas kantema, aŭ **plorema,** aŭ **parolema**. Tio estus kvazaŭ diri: **mi estas blondhara** aŭ **bluokula**. Ne, vi diros move: **mi estas ema kanti** aŭ **ema paroli.** Vi diros eĉ ankoraŭ pli fortesprime: **mi emas plori.** Kaj jen via sufikso jam fariĝis, ne nur adjektivo, sed eĉ verbo . . . por vivi.

Se vi aŭdis tro multfoje „paliĝis", vi trovos ĝin tro eluzita kaj ne sufiĉe forta por esprimi vian impreson rakontante pri malfeliĉa homo, kiu aŭdas pri mortigo de l' filo. „Lia vizaĝo paliĝis" ne taŭgas. Ankaŭ ne „blankiĝis". Sed kiel forte sonas la malpli kutima formo „iĝis pala" aŭ „iĝis blanka"!

Kontraŭe, ĉar vi pli kutimas aŭdi, ke **sinjoro A. aŭ B. fariĝis grafo** aŭ **iĝis kapitano,** vi nature diros, ke li **grafiĝis** aŭ ke li **kapitaniĝis** por esprimi mokon. Ĉiam la nekutima, do ne eluzita, eĉ neatendita esprimo estas la plej trafa por esprimi sentan koloron.

8. Sento kaj gramatiko

Sentaj intervenoj en elementajn signojn gramatikajn. Sentoplena uzo de -as, -o, -a, -e. Libera rajdado sur sintakso. Nelogika uzo de verbaj tempoj kaj modoj: -us, -u. Falsaj neoj. Falsaj demandoj. Diferenco inter aserto, priskribo kaj esprimo de sentoj. Fotografado kaj pentrado. Komuna lingvo kaj literaturo.

Ni konstatis la emon de la sentoj elekti prefere kiel plej trafan esprimilon ĉiam la malplej kutiman formon. Tiun emon oni konstatas, ne nur en ordigo de la vortoj en frazo aŭ en uzo de sufiksoj, sed eĉ en rimarkindaj influoj ĉe la plej simplaj elementaj signoj gramatikaj, kiel -o, -a, -e, -as, -is ktp.

La plej konata estas la verbigo de adjektivoj: „El la maro roko grandegas." Ĉiu sentas la esprimfortan diferencon inter tio kaj „estas grandega". Same „la maro bluas" aŭ „la kampoj verdas". Iu klopodis klarigi tiun fenomenon asertante, ke **verdas** similas kvazaŭ agon, kiel **brilas** aŭ **radias**. Li ne bezonis tiom klopodi. Certe la impreso estas simila, sed la lingva kaŭzo de la uzo estas antaŭ ĉio la malofteco de la formo kaj pro tio ĝia frapeco.

Ion tute similan vi rimarkos ĉe „imperiestre" anstataŭ „kiel imperiestro" por priskribi tonon de ordono, aŭ „instruista" anstataŭ „de instruisto" por priskribi prelegon. Ne cerbumu longe por serĉi abstraktajn filozofaĵojn, se mi ekkiros **kiel blanka! kiom blanke!** aŭ **kia blanko!** ekvidante la ĉionkovrantan neĝon je la unua vintra mateno. La plej forta estas la plej nekutima, nenio pli. Fine, la gramatiko ne ekzistis en ĉielo antaŭ ol naskiĝis homoj. Ĝi estas nur konvencio por faciligi — kaj foje malfaciligi — la studon pri lingvoj. Miljarojn la homoj uzis hakilojn ŝtonajn kaj poste metalajn antaŭ ol lerni, ĉu **hakilo** estas substantivo kaj **haki** verbo. Eĉ hodiaŭ la angla lingvo ne diferencas **vesto** kaj **vesti (dress).**

Eĉ ankoraŭ pli libera estas la rajdado de la sentoj sur la sintakso kaj alia dancado kun la verbaj tempoj kaj modoj. Tie vi povos observi la plej petolajn forvagojn el la rekta vojo de la strato Logiko. Vi rakontas aferon, kiu okazis hieraŭ, do en la pasinteco, kaj jen mi aŭdas vin diri „jen alvenas tiu fripono, eniras sensalute, iras al la ŝranko" . . .

Ĉu tio estas logika? Ne, sed vi uzis **-as** anstataŭ **-is** por esprimi vian surprizon kaj igi min kompreni ĝin. Multaj lingvoj faras la samon, ĉar ili ne havas pli taŭgan rimedon. Vi kare amas vian fileton kaj ne deziras al li doloron. Tamen oni aŭdis vin diri al la knabeto: „Metu la manon al la forno kaj vi ja bruligos vin". Ĉu vi efektive ordonas kaj volas, ke li faru tion? Male, vi avertas, ke li ne faru. Logike vi devus diri „se vi metos . . .", sed tio estus tro trankvila. Simile vi krias: „Nu, prenu la tutan kukon sur vian teleron, kial ne? Ni lekos niajn fingrojn dume." Tio estas irono, ĉar li eltrancis por si tro larĝan pecon. Tiu mallogikaĵo esprimas mokon, hontigon.

Esperanto posedas apartan formon por supozoj, hipotezoj, tio estas la verba finaĵo **-us,** ĝenerale uzata kun **se.** Logiko instruas diri: „Se vi aĉetus aŭtomobilon, vi konstatus, ke ĝi poste kaŭzas sufiĉe grandan elspezon ĉiujare pro riparoj, purigado ktp."

Tiel oni diras logike, tiel oni skribas eble en lernolibroj. Sed neniu parolas tiel. Kun sento kaj vivo la informanto ekkrias: „Aĉetu maŝinon kaj vi vidos, kiom ĝi kostas ĉiujare!" Kial uzi ordo-

nan formon kun -u anstataŭ la logikan supozan formon kun **-us**? Vi povus egale demandi kial vivi, kial ami.
Sed ne haltu tie. La logika formo por la deziro estas ĝuste -u, kaj ni devus diri: „Mi povu iam vojaĝi al Romo!" Tamen vi konstante aŭdas: „Se mi povus iam vojaĝi al Romo!" Tiu mallongikaĵo esprimas sopiron. Ĝi estas falsa supozo.

Lu tuta sintakso de vivanta lingvo abundas en tiaj falsaj supozoj, falsaj demandoj, falsaj neoj. La angla lingvo konstante uzas „Ĉu vi faris?" post asertoj, ke vi efektive faris ion. Ankaŭ en Esperanto ni ŝatas esprimi per **ĉu,** per **kiom** aŭ per **ne** nian surprizon, kiam ekzistas neniu ajn intenco demanda aŭ nea: „Ĉu vi parolas tiel al via panjo? Kiom da fojoj mi jam klarigis al vi?" Simile: „Jancĵo, vi ne faris tion!", kiam la fakto frapis la okulojn viajn kaj vi jam ekriproĉas.

Multaj hindo-eŭropaj lingvoj esprimas miron per tiaj esprimoj: „Vi ne diras!" kaj admiron per rimarkindaj demandaj formoj kiel ekzemple „Kion li posedas kiel sanon, fortikecon, elastecon?" Esperanto kontentiĝas per pli simplaj formoj kiel: „Kia sano, fortikeco, elasteco!", aŭ por esprimi surprizon, la nudan kaj tre fortan „ĉu?" ekster la logika senco kaj starantan sole.
Lingvo absolute logika devus enteni apartajn gramatikajn formojn por esprimi ĉiujn sentojn. Tiam ĝi bezonus neniajn tiajn „nerektajn" esprimrimedojn. Sed eble mankus tiam salo kaj vivo. Ĉar ekzistas granda diferenco inter **esprimi** senton kaj nur **aserti** aŭ eĉ **priskribi** ĝin.

Mi ja povas tute bone trovi la trafajn vortojn por diri, ke „Min tre surprizas via neanoncita alveno. Ĝi min frapas kaj kortuŝas." La sento estas tie asertita kaj priskribita. Sed se vi ekkrios: „Vi, tie ĉi! Ne eble! Ho mia Jancĵo!" Tiam la sento estos esprimita. La diferenco estas grandega, kvankam la senco tute sama.
Simila diferenco apartigas arton de simpla fotografado aŭ de nura muldado je mortinta figuro. Esprimante sian impreson, artisto forlasas logikan akuratecon, forigas, trograndigas, elektas, emas frapi per malkutimaj, eksterordinaraj formoj. Tion oni nomas lia originaleco.

Ĉiu lingvo posedas sian originalecon en la komunaj spontanaj esprimiloj uzataj kaj ripetataj de siaj parolantoj, sed ankaŭ en tio, samkiel pri vortradikoj, lingvoj estas interparencaj.

Se temas, ne pri spontana kaj komuna parolado, sed pri ellaborita kaj tute persona elekto de tiaj esprimiloj, kun intenco daŭre impresa kaj estetika, tiam ni tuŝas la kampon de literaturo.

9. Sentoj kaj internacieco

Rezultatoj de la studo. Nura ekgusto. Kompara stilistiko. Internacia komuneco. Samaj bezonoj. Similaj procedoj. Miro kaj admiro. Hako, ripetado, trograndigo. Ironio. Sankcio de l' kompreno. Unueco. Influoj de l' ekstero. Reagoj. Limigita internacieco okcidenta. Influo de l' Oriento. Esperantaj proprajoj. Malsukceso de -ĉj kaj -nj. Ĝia klarigo.

La antaŭaj ĉapitroj ne pretendas esti plena kaj sistema studo de ĉiuj esprimrimedoj en Esperanto. Ili celas nur ekmontri la vojon al tia studo, kiu estus vasta kaj interesplena laborkampo por serĉistoj en lingvoscienco.
Ĝis nun oni plej ofte studis lingvojn el nura vidpunkto de iliaj ekzistantaj elementoj. Valorus ilin ekstudi ankaŭ el vidpunkto de ilia celo. Eĉ la multvalora iniciato de Profesoro Bally pri stilistiko ankoraŭ ne puŝis la lingvosciencon al sufiĉe radikala provo de metodrenverso. Mi ŝatus vidi studentojn esplori kaj priskribi, kiel Esperanto — aŭ alia lingvo — esprimas miron, admiron aŭ malŝaton ktp. kaj klasigi la rimedojn laŭ la bezonoj kaj ne nur laŭ la eblecoj.
Fakte tia studo kondukus rekte al kompara kaj komuna stilistiko, unue de hindo-eŭropaj lingvoj, kaj poste de ĉiuj homaj lingvoj. Estas nedubeble, ke la bezonoj de la sentoj estas ĉie samaj kaj ke pluraj esprimrimedoj retroviĝas preskaŭ ĉie, speciale en la lingvoj — hindo-eŭropaj aŭ ne — de tiuj nacioj, kiuj partoprenas la saman komunan civilizon.
Cetere la ĉefaj bezonoj ne estas tiom multaj. Vi jam plenumos grandan parton de l' esploro, se vi atentas pri la jenaj sentoj: Surprizo kaj miro, be-

daŭro kaj sopiro, timo kaj dubo, amo kaj malamo, kun korespondaj impresoj: admiro kaj malplaĉo, ironio karesa aŭ moka, ĝojo kaj malĝojo.

Fakte la procedoj estas sufiĉe limigitaj en ĉiuj lingvoj kaj nur ilia kombinado kreas abundan variecon da nuancoj. Observu ekzemple, ke miro, surprizo, timo kaj dubo preskaŭ same agas:

„Kio? Li? Tie ĉi? Ĉu eble?

Tranĉo, hako de la frazo kaj reganta demandado, jen la komuna procedo, ne nur en Esperanto, sed en kiom da ceteraj lingvoj? Sentaj juĝoj, favoraj aŭ malfavoraj, uzas ĉiam la rektan procedon de trograndigo kaj trovas en vortaro kaj sufiksoj abundan materialon por tio: „Bona, bonega, anĝelo, la plej bona sur tero!"

Sufikso, bildo, komparo servas egale al tiu konstanta emo. El simpla ripetado de primitivaj lingvoj ankoraŭ efikus en niaj: „Bona, bona, bona! Vi ne povas imagi eĉ kiom.

Por esprimi malplaĉon, vi trovas tute simile: „Teda, teda, teda, netolerebla, mortiga"; kaj se tiuj procedoj ne sufiĉas, vi retrovas ĝuste la samajn, kiujn oni uzas jam por miro kaj surprizo: „Kion? Tio? Pentraĵo? Ĉu vi mokas?" Hako de la frazo en pecetojn, demandado, denove la samaj procedoj. Fakte la surprizo mem fariĝas rimedo por esprimi la malplaĉan senton. En multaj lingvoj vi observos tion.

Krom la trograndigo, vi notos ankaŭ la procedon ironian. Ĉu ĝi multe varias? Ne tiom. Rido venas el kontrasto. Tial ironio konstante uzas falsajn neojn aŭ falsajn malojn, diras „bela laboro!" por signifi skandalan fuŝaĵon aŭ nomas „kompatinda malriĉulo" usonan miliardulon.

Tamen sur la kampo pri ŝercoj kaj ironio, unu el la plej interesaj, mankas la sama grado de internacieco, kiun oni trovas en aliaj. Tial Esperanto, ĉiam gardata per la kontrolo de l' kompreno, restis multe pli prudenta, kiel ni rimarkis en ĉap. VI. Ne forgesu, ke ĝin uzas por interparolo ĉefe diversnaciuloj kaj nur esceptokaze samlingvanoj. Tiu konstanta sankcio estas la plej efika konservanto kaj eĉ akcelanto de **unueco**. Sub natura kontrolado kaj limigo Esperanto devis fatale fleksiĝi al ĉiuj postuloj de la sentoj, sen kiuj homoj ne estus homoj, sed nur intelektaj maŝinoj. Kaj tio estas la plej internacia parto de la lingvo, multe pli ol ĝia regula gramatiko kaj eĉ ol ĝia roman-germana vortaro.

Efektive la homa psikologio estas profunde unueca malgraŭ ĉiuj rasaj kaj lingvaj bariloj. Ĝi do emas al unueca speguliĝo. Samaj sentoj elŝprucas simile en homan parolon. Plie, se la lingvaj sistemoj estas jam parencaj, kompreneble iliaj fleksiĝoj estos ankoraŭ pli similaj.

Ankaŭ ne forgesu la potencan agadon de l' ekstero. Ni jus konstatis ĝin en la limiga kontrolo de l' kompreno, sed ni ĝin observis ankaŭ en la enfluo de radikoj aŭ novaj sufiksoj. Kompreneble ĝi estas egale rimarkebla en la rimedoj de la lingvo por esprimi sentojn.

Ni ĝin montris jam ĉe la bildoj (leono aŭ anĝelo). Reprenu la ekzemplon de „mirinda". En granda nombro da lingvoj vi retrovas tiun procedon de interprunto de procedoj inter la diversaj sentoj: kiam trograndigo ne plu sufiĉas al admiro por sin esprimi, ĝi puntas ĉe surprizo aŭ eĉ similas mem surprizon: „mirinda!" Internacia fenomeno.

Kio estos plej interesa, tio estas la studoj kaj kritikoj de Esperanto-parolantaj lingvistoj orientaj, ĉinaj aŭ japanaj. Ili montros al ni, kiuj el tiuj internaciaĵoj estas al ili facile aŭ malfacile kompreneblaj, kiuj ekzistas aŭ mankas en iliaj gepatraj lingvoj. Tiam ni havos ekbildon de tio, kio estas absolute internacia aŭ nur rilate internacia, kiel la radikaro de Esperanto.

La sankcio mem de la kompreno, ne nur en Okcidento, sed en Oriento, jam helpis en aliaj rilatoj la venkon de interna sistemeco kontraŭ ekstera „internacieco". Inter la rektaj rimedoj de sent-esprimado, tio ankaŭ efikas por plisukcesigi la proprajn esperantaĵojn, kiel ekzemple la tre vivan sufikson **-eg,** tiun nekompareblan ilon por trograndigi.

Ke la du karesaj sufiksoj **ĉj** kaj **nj** (el slava deveno) preskaŭ ne sukcesis, tion klarigas evidente du ĉefaj kaŭzoj:

unue la fakto, ke ili ne konformiĝas al la interna sistemeco de l' ceteraj sufiksoj, ĉiam komencantaj per vokalo kaj aldoneblaj al la radikfino.

Forigi parton de la radiko por diri **paĉjo, panjo, fraĉjo, franjo,** tio timigas ĉiujn neslavajn parolantojn, instinkte sintenantajn al la solida bazo de l' Esperanta analogio. La lingvo preskaŭ reĵetis tiujn du „fremdaĵojn" kaj anstataŭis ilin en la praktiko per pli facile uzebla **-et**. La logiko suferis, sed la analogio gajnis ĉiurilate, interne kun la ceteraj Esperantaj sufiksoj, kaj ekstere kun la tre internacia kutimo esprimi amon per procedoj de etigo, speciale, kiam temas pri virinoj kaj infanoj. La dua kaŭzo de la malsukceso de **ĉj** kaj **nj** estas la fakto, ke la neslavaj nacioj ne tiom kutimas enmeti karesan nuancon en sian parolon. Multaj estas pli sinretenaj en esprimo de sentoj, speciale anglo-saksoj. Tial la internacia lingvo ne kreskigis ĉe si la uzon de tiu disponebla rimedo kaj parte malprofitis okazon de riĉigo,*) sed ankaŭ de malsimpligo.

10. Sentoj kaj Fundamento

Ĉu vivo detruas simplecon? Komparo de la bazoj en Esperanto kaj gepatra lingvo. Ludo de la sentoj sur baza klavaro. Komparo de fundamentoj. Ĥaosa bazo. Orda bazo. Klara rekonebleco de la devojiĝoj. Konfuzo inter riĉeco kaj malordo. Normala elkresko el bazo. Normala konservo de la bazo. Komparo inter uzo de fremda nacilingvo kaj uzo de Esperanto.

Se la leganto kuraĝis alveni ĝis lasta ĉapitro de tiu ĉi resuma studo, estas necerte, ĉu li konsentos kun nia konsilo al studantoj, daŭrigi sur tiu kampo kaj aperigi la rezultaton de siaj serĉlaboroj.

Nu, ekkrios pli ol unu, tiam Esperanto aperos tiom malfacila, kiom iu ajn lingvo. Vi prezentos al la publiko veran ĥaoson kaj perdos ĉiun profiton de la simpla, genia Fundamento.

Kia eraro! Komparu momente Esperanton kaj vian nacian lingvon. Ambaŭ posedas logikan skeleton aŭ gramatikan fundamenton. Sur tiu baza klavaro viaj sentoj ludas kvazaŭ fortepianon. Per pli-malpli fortaj tuŝoj aŭ tuŝetoj, iomaj devojiĝoj el pura logiko, trograndigoj aŭ kolorigoj, viaj impresoj aŭ emocioj komuniĝas al viaj aŭdantoj samtempe kun la faktoj priparolataj. Ĝuste tio faras vivantan lingvon. Sen tio vi havus nur signalkodon aŭ algebran sistemon, sed ne homan lingvon.

Sed observu tuj la diferencon. La fundamento de via nacia lingvo estas malsimpla, malregula, ofte eĉ nelogika. La klavaro, sur kiu vi devas ludi kun fantazio de la sentoj, estas ja fiksa kiel en Esperanto, sed difektita kaj senorda kun multegaj signoj por montri simplajn ideojn, kiel **-is** aŭ **-o,** kaj nur unu signo por montri gravŝ malsamajn ideojn, kiel **ke, kiujn, ol** ktp.

Sur tiu necerta bazo viaj sentoj ludas, kaj iliaj tuŝoj, devojigoj, trograndigoj ktp. aldonas novan elementon de malordo al jam ekzistanta malordo. La rezultato estas efektive ĥaoso, almenaŭ en la okuloj de la fremdulo, kiu ne povis pasigi tutan sian junaĝon, kiel vi mem, por funde koni la fundamentan klavaron.

En Esperanto estas malsame, ĉar la fundamento estas klara, simpla kaj orda. Ne nur vi sufiĉe facile ekkonas kaj mastras la bazan klavaron de la fortepiano, sed vi ĉiam nete rekonas ĝin en ludado kun ĝiaj fiksaj unuformaj signoj **-o, -a, -e, -as, -is, -os, kio, tio, kiam, tiam** ktp.

Viaj sentoj ludas, tuŝas, saltas trograndigas, kolorigas, devojigas, sed la klavaro ĉiam restas klara kaj orda, brilante sub la movantaj ondoj. Fakte la forteco mem de viaj parolaj fantaziaĵoj devenas ĝuste de tio, ke oni povas ĉiam konstati vian salton el la logiko kaj kvazaŭ mezuri sente la distancon inter viaj flankensaltoj kaj la rekta linio.

En lingvo, kie la fundamenta linio jam terure zigzagas, imagu la cerbumadon por retroviĝi!

Estas granda eraro imagi, ke la riĉeco de naciaj lingvoj konsistas el la malsimpleco aŭ senordeco de ilia gramatika fundamento. Tute ne. Ĝi konsistas el la abundeco de sinonimoj kaj ĝeneraligitaj bildoj, kio estas tute alia afero.

Renverse, estas simila iluzio kredi, ke

„nepre“ la riĉiĝo de Esperanto je sinonimoj kaj bildoj igos ĝian Fundamenton baldaŭ tiom malsimpla kaj senorda kiel tiu de nacia lingvo. Kial? Neniu fakto pravigas tian supraĵan konkludon. Ĉu **ega** ŝanĝis la fundamentan rolon de **eg**? Tamen **granda** ricevis utilan sinonimon.
En fajro de l' rakonto vi ja diros, ke vi „sidis ĉe tablo“ kaj „jen envenas trudulo“. Tiu nelogika **-as** tradukas vian senton de surprizo, ĝuste ĉar oni ricevas la frapon de ĝia neatenditeco. Ĉu tio ŝanĝas la Esperantan konjugadon de verboj **-as, -is, -os?** Ĉu iam ni havos tri cent diversajn finaĵojn anstataŭ **-is?** Ne kredeble. La klareco de la fiksa Fudnamento estas tiel oportuna, ke la natura leĝo de l' „malpli granda peno“ plej supozeble konservos ĝin senŝanĝe.
Kio devigas al plia lernado, tio estas la eksteraj pruntoj de novaj radikoj aŭ la internaj kristaligitaj bildoj. En Fundamento restas senŝanĝe **sam', ide,' an'** kaj **-o,** sed vi devas klarigi nun al la lernanto la specialan kaj sentoplenan sencon de „samideano“. Tio neniel estas rompo de la Fundamento, ĝi estas nur la vivo, la karno sur ostoj kaj la florado de bela korpo sur ĉiam solida skeleto.
Kion oni povas konkludi el tiu aro de faktoj observitaj? Ke Esperanto vivas, kiel ĉiuj lingvoj uzataj parole, sed ke ĝi konservas sian fiksan Fundamenton, kiel ĉiuj lingvoj skribataj kaj presataj. Ĝian vivon kaj ĝian evoluon regas la samaj leĝoj kiel ĉe ceteraj lingvoj. Ni tamen notu unu gravan diferencon, tio estas la fakto, ke Esperanto tre malofte ludas rolon de ĉiutaga aŭ gepatra lingvo. Por la plimulto de l' anoj, ĝi restas helpa lingvo, uzata en esceptaj okazoj. Tio malrapidigas ĉiujn movojn en la lingvo, inkluzive la efikojn de la leĝo pri eluzo de esprimoj.
Sed oni tamen ne povas kompari la uzon de Esperanto kun la uzo de fremdaj naciaj lingvoj. Tiu ĉi lasta estas tute ne natura kaj tute ne libera. La fremduloj sin esprimas ĝenerale kun ĝeno kaj embaraso, timante fari erarojn kaj iĝi ridindaj. Ni lasu flanken la esceptajn okazojn, kiam fremda lingvo fariĝis la ĉiutaga lingvo de enmigrinto.

En Esperanto kontraŭe la homoj parolas multe pli libere kaj sentime. Ne havante antaŭ si „nacianojn“ por kontroli kaj moki, ĉiuj sentas sin egalaj kaj pli senĝenaj. Tial ili riskas esprimi sentojn kvazaŭ en gepatra lingvo kaj lasi la langon flui pli senkontrole, se ili kutimiĝis iom al uzo de la lingvo.
Ili sentas sin mastroj de la ilo kaj ne la ilon mastro de ili. Pro tio Esperanto estas vivanta lingvo, dum la uzo de fremdaj lingvoj estas multe pli malproksima de la vivo kaj plej ofte peza, malnatura, „lernolibra“ kaj tute ne spontana.
Fine la uzo de la diversnaciaj parolantoj faras Esperanton, dume la uzo de la fremduloj ne faras nacian lingvon, sed nur difektas ĝin, kio estas ja fundamenta diferenco. Dum la homoj ĝenerale sentas sin nur gastoj aŭ sklavoj ĉe fremda lernita lingvo, ili sentas sin mastroj de la domo ĉe Esperanto. Tio estas situacio multe pli proksima je ilia rilato al propra nacilingvo.
Se nenion alian, almenaŭ tion ilustras ĉiu studo pri la fluado de l' vivo en Esperanto.
Necesas tamen ankoraŭ klarigi la vorton „mastroj“. Ankaŭ en gepatra nacilingvo la homoj ne estas mastroj de la Fundamento. Ili ne sentas kaj ne havas liberecon ŝanĝi la hereditan bazon, la skeleton de la lingvo. Ili eĉ ne pensus je sistema ŝanĝo de la verbaj finaĵoj aŭ de la parola signo por multnombro. Kiuj ŝanĝoj okazis tra centjaroj, tiuj efektiviĝis en epokoj sen presado, sen unuigo centra, sen lernejoj ktp. Nuntempe la lingvoj estas multe pli fiksaj kaj unuecaj.
En iuj esceptaj kazoj vi povas observi iom-postioman forlason de malregulaj maloftaj formoj, sukceson de popolaj „eraroj“, kaŭzitaj de la natura emo por analogio. Sed neniu sentas sin libera kontraŭ la fundamento mem. Tia libereco ja kostas tro kare en sociaj rilatoj.
Ne. Liberaj kaj mastroj sin sentas la homoj, ne kontraŭ la skeleto de sia nacilingvo, sed en la viva ludado de la sentoj sur tiu netuŝebla bazo, do ĝuste en la kampo de nia studo. Rilate al Esperanto la situacio estas ĝuste la sama tiurilate.

Dume, ĉe lernita eksterlanda lingvo, escepte en maloftaj okazoj de absoluta plenakiro („kiel enlandano"), la parolantoj sentas nenie liberecon kaj ne povas esprimi facile siajn sentojn pro timo rompi la skeleton mem. Kiuj tamen kuraĝas, tiuj elbuŝigas apartan personan dialekton, eble ĉarman kaj amuzan, eble teruran kaj suferigan.

Ĉe internaciaj kongresoj ili preferas ĝenerale prepari skribe tion, kion ili deziras diri fremdlingve kaj tiam ĝi perdas ĉiun vivon kaj reduktiĝas al nura intelektaĵo. Tion ili legas, sed ne kuraĝus presigi kiel broŝuron sen submeto al ekstera korektado. Oni ne rakontu pri libereco, kiam la homoj devas timi improvizan paroladon kaj ne povas eĉ skribe publikigi senĝene sian intelektan penson kaj ankoraŭ malpli sian vivan sentesprimadon.

Estas dezirinde, ke en mondlingvo, kiel en propra nacilingvo, la homoj povu tute libere, mastre kaj ankaŭ **egale** sin esprimi parole kaj skribe. Kiam grandnacia lingvo ludas la rolon, tiu kondiĉo estas plenumita almenaŭ por ĉiuj ties nacianoj, sed ne por la plimulto de la ceteraj. Kiam Esperanto ludas la rolon, la kondiĉo malfermiĝas al ĉiuj egale. Unu horo ĉe internacia kongreso en Esperanto kaj unu horo ĉe tutmonda kunveno en angla aŭ franca lingvo jam ilustras la diferencon. En la dua, elokventaj aŭ spritaj rimarkoj venas nur el unu flanko, en la unua ili venas de ĉiuj, kaj la aŭdantaro ĉion partoprenas kaj sekvas same kiel en iu kunveno **nacia.**

Estas nedubeble, ke la plej forta antaŭjuĝo kontraŭ Esperanto venas de sincera kredo, ke ĝi posedas nur la fiksan „skeleton" kaj neniun eblecon de vivo kaj delikata esprimo de nuancoj. Se la intelektuloj tion kredantoj bonvolus fari la paŝon de nura antaŭjuĝo al objektiva scienca esplorado, tio estus granda gajno por la vero kaj sekve por la homaro. Nur sur la vero estas eble konstrui tion, kio daŭru.

*) Cetere tiuj du sufiksoj estis intencitaj de Dro Zamenhof speciale por propraj antaŭnomoj, kaj oni trovas ilin ĉe Sonjo, Janĉjo ktp. Sed ili havis certe ŝancon pli enpenetri en la komunan lingvon tra la pordo malfermita per panjo kaj paĉjo sen la du supre montritaj kontraŭkondiĉoj.

(Fino)

Denove en Bad Saarow

Internacia seminario „Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado"

La ĉi-tema seminario okazis inter la 10a kaj 15a de novembro 1986 en la konata seminariejo kaj ripozejo de Kulturligo de GDR en Bad Saarow (ĉe Berlin, GDR). Partoprenis 21 fakuloj kaj interesitoj el Bulgario, ČSSR, FRG, GDR, Hungario kaj Pollando. Oni aŭskultis kaj verve debatis jenajn prelegojn:

— Kiel nomi la lingvon de Zamenhof: Esperanto aŭ ILo (d-ro Detlev Blanke, GDR)
— Komenco de organizita Esperanto-movado en la mondo (Olga Cankova, Bulgario)
— Historio de la scienc-teknika apliko de Esperanto (prof. d-ro Otto Haszpra, Hungario)
— Evoluo de terminologiaj principoj: influoj inter planlingvo kaj etnolingvo (Wera Blanke, GDR)
— Sociologia difino pri Esperanto — la strategia fono de la problemo (Sandor Révész, Hungario)
— Sociologia analizo de la bulgara Esperanto-movado (Kunĉo Valev, Bulgario)
— Kelkaj rimarkoj pri metodologiaj aspektoj de la verkado pri historio de landa Esperanto-movado — okaze de recenzo Siegfried Linke, GDR)
— Pri internaj ŝanĝoj de la 85jara hungara Esperanto-movado (d-ro Árpád Ratkai, Hungario)
— Stato kaj metodologiaj problemoj de la esplorado pri la historio de la germana laborista Esperanto-movado (d-ro Detlev Blanke, GDR)
— Lingva kvalito kaj publika opinio (Michael Behr, GDR)
— Juraj aspektoj de landaj esperantistaj organizaĵoj (Boleslaw Staszczak, Pollando)
— Reflektiĝo de socisistemaj diferencoj en la leksiko de Esperanto (d-ro Detlev Blanke, GDR)

La lastan tagon okazis tre vigla diskuto pri la motivoj de la lernado de Esperanto kaj pri la eventuala forlaso de la movado fare de ĝiaj adeptoj.

Krome okazis diapozitivaj prelegoj pri Pekino (Universala Kongreso 1986, d-ro D. Blanke) kaj Esperanto sur poŝtmarkoj (Rudolf Burmeister, GDR).

Boleslaw Staszczak informis pri la preparlaboroj lige al la jubileaj kongresoj 1987 en Pollando, aparte pri la 72a UK, kio vekis fortegan debaton pri la celo kaj enhavo

de la jubilea kongreso. La seminario sendis al UEA, al LKK kaj al Pola Esperanto-Asocio ĉi-rilate proponojn por konsidero.

Krom la kadrotema seminario okazis kunsidoj de kelkaj fakuloj pri la problemo de scienc-teknika aplikado de Esperanto, sub la gvido de la UEA-estrarano prof. d-ro Otto Haszpra. La ĉefajn konkludojn de la seminario kaj de la grupo pri scienc-teknika apliko de Esperanto ni publikigas sube. La seminarianoj ekskursis dum unu tago al Berlin, ĉefurbo de GDR. La tuta seminario okazis sub ekskluzive bonegaj teknikaj kondiĉoj kaj ofertis bonkvalitan plenan pensionon por la ridinde malalta prezo de nur 100 markoj.

Rekomendoj de la seminario

Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR okazigis internacian seminarion „Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado" 1986-11-10/15 en Bad Saarow, kiun partoprenis historiistoj, sociologoj kaj movad-aktivuloj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, FRG, GDR, Hungario kaj Pollando.

Konkludante el la prelegoj kaj diskutoj la partoprenantoj rekomendas:

1. ke la landaj asocioj savu, sisteme kolektu kaj utiligu la fontomaterialojn rilatajn al la historio de la Esperanto-movado;
2. ke ili prilaboru komunan metodaron por sociologiaj esploroj pri la Esperanto-movado atentante la jam ekzistantajn materialojn (precipe la bulgaran kaj ĉeĥan): ke la rezultoj de unuopaj enketoj faritaj de fakuloj **estu kompareblaj** kaj la scienca nivelo estu garantiata;
3. ke ili zorgu pri eblecoj forigi la fakan izolitecon, internaciskale kunordigu la movadhistoriajn kaj sociologiajn esplorojn, organizu metodologian perfektigon de eventualaj aŭtoroj kaj stimulu la eldonagadon.

La partoprenantoj plue rekomendas

4. ne subteni la anstataŭigon de la tradicia nomo de Esperanto per ekskluziva uzo de alia termino;
5. registri pli zorge la reflektiĝon de socisistemaj diferencoj en la leksiko de E-o;
6. subteni kaj evoluigi la internacian kunlaboron organizante similajn aranĝojn;
7. plibonigi la reciprokan informadon pri la strukturo kaj aktivado de la landaj asocioj.

La partoprenantoj dankas al la organizantoj pro la aranĝo de la seminario en „Eibenhof", Bad Saarow, kiu estis tre taŭga ejo por sincera laboro kaj komforta restado.

Junulara renkontiĝo en Bernburg, vidu p. 41

Pri scienc-teknika apliko

— Rezulto de kunsidoj —

Enkadre de la Internacia Seminario pri „Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado" kunvokita kaj organizita de GDREA inter la 10a kaj 15a de novembro 1986 en Bad Saarow la organizantoj donis eblecon por kelkaj diverslandaj reprezentantoj de la aplikado de Esperanto sur natursciencaj kaj teknikaj terenoj por pridiskutado de la ĉi-rilataj situacio kaj taskoj kun la celo helpi la laboron de la proksimestonte kunvokota natur-scienca kaj teknika komisiono de UEA.

En la traktado de la temo enkadre de la aparta scienc-teknika sekcio de la seminario partoprenis: Aleš Bednařik (CS), Michael Behr (GDR), Wera Blanke (GDR), D-ro Otto Haszpra (H), Boleslaw Staszczak (PL), Petar Todorov (BG).

Sub la prezidado de s-ro Haszpra (estrarano de UEA pri scienc-teknika aplikado [STA] de Esperanto) la kunvenintoj pritraktis la temojn laŭ la sekva tagordo:

— Enkonduka prelego: Antaŭajoj, celoj kaj laborplanoj de UEA pri STA (Haszpra),
— prelegetoj pri spertoj koncerne STA en unuopaj landoj,
— prelegeto pri la stato kaj taskoj de la terminologia agado (W. Blanke),
— diskuto pri la enhavo kaj utiligeblo de la Jubilea informmaterialo de UEA pri STA,
— diskuto pri la laborplano de UEA kaj pri taskoj de la UEA-komisiono pri STA kaj de landaj kaj fakaj asocioj,
— formulado de rekomendoj pri la laborplano de UEA por la unua kunsido de la UEA-komisiono pri STA.

Rezulte la sekcio konstatis, ke la rezolucio pri faka agado formulita dum la UK en Pekino 1986 kaj akceptita de la Komitato de UEA kaj same la konkludaroj de la internacia seminario pri „Aktualaj problemoj de la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto" aranĝita en Bad Saarow (GDR) fine de 1982 estas absolute aktualaj kaj utiligeblaj kiel gvidlinio por la agado de UEA en la scienc-teknika kampo.

La sekcio konstatis, ke la rezolucio de UNESKO 23C/Res. 11.11 akceptita en la jaro 1985 estas multflanke utiligebla por la plifirmigo kaj evoluigo de la pozicio de Esperanto ankaŭ en sciencaj kaj teknikaj rondoj.

La sekcio konstatis, ke la materialo „Esperanto — lingvo de la natur-sciencoj kaj tekniko" taŭgas post kelkaj negravaj modifoj kiel ĝenerala informaro por sciencaj kaj teknikaj rondoj kaj kiel baza materialo por inform-celaj artikoloj en neesperantistaj fakjurnaloj kaj fak-kunvenoj, tamen estas kompletigenda per bibliografiaj indikoj.

La sekcio trovis, ke la ĝenerala inform-materialo „An Update on Esperanto" lastatempe preparita de UEA kelkloke bezonas modifojn parte por eviti malfavorajn reagojn en kelkaj regionoj kaj kultursferoj, parte por pli serioze prezenti la fakan utiligeblecon kaj jeman utiligitecon de la lingvo en la epoko de la scienc-teknika revolucio.

La sekcio trovis urĝa, ke la planita natur-scienca kaj teknika komisiono de UEA fakte formiĝu kaj komencu sian agadon kiel eble plej frue, ke jam dum la jubilea jaro la unuaj rezultoj estu atingeblaj. La sekcio konstatis, ke tiu komisiono kunsidu temp' al tempo en diversaj landoj kaj porokaze kompletigu sin per elstaraj fakuloj-esperantistoj de la koncerna kaj najbaraj landoj.

La sekcio aparte emfazis, ke la efika organizado kaj unuecigo de la terminologia agado estas nemalhavebla parto de la evoluigo de la scienca kaj teknika aplikado de la lingvo kaj ĝi apogas la decidon de UEA fondi termin-normigan institucion kaj reton, en kiu laŭeble kunlaboru ĉiuj elstaraj individuaj kaj kolektivaj kultivantoj de la terminologia kampo.

La sekcio emfazas, ke la landaj kaj fakaj asocioj kaj institucioj aktive partoprenu en la disvolvado de la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto — laŭeble nomante eĉ apartan komisionon aŭ almenaŭ komisiitojn pri scienc-teknika aplikado — dum la centraj organoj (estraro, komitato) donu gvidprincipojn kaj moralan kaj laŭeble financan apogon por tiuj laboroj. La gvidprincipoj estu rezulto de vastskala pridiskutado en fakaj rondoj, dum la morala kaj financa apogo estu tiagrada, kian tiu agado plenumanta gravajn postulojn de la moderna epoko meritas kaj nemalhaveble bezonas.

La sekcio rekomendas, ke la unua kunsido de la Scienca kaj Teknika Komisiono de UEA vaste utiligu tiujn detalajn rimarkojn kaj proponojn, kiujn la partoprenintoj de la scienc-teknika sekcio de la seminario de Bad Saarow kolektis.

La sekcio petas, ke proponoj pri la scienc-rilata agado de UEA kaj de ties aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj estu senditaj urĝe al la estrarano pri scienc-teknika agado de UEA.

TRADUK-KONKURSO 1987

La „traduk-konkursoj" organizitaj de „der esperantist" de post kelkaj jaroj fariĝis nun jam tradiciaj kaj trovis multajn ŝatantojn inter la esperantistoj de nia lando. Multaj bonvenigas la eblecon provi kaj pruvi siajn lingvokonojn.

Tial ni ankaŭ en la jaro 1987 aranĝas la „traduk-konkurson". Ĉi-foje ĝi staras sub la signo de la 750-jara jubileo de nia ĉefurbo Berlin.

Kondiĉoj:

— Traduku laŭ via elekto fejetonon el la libro „Der Berliner zweifelt immer", prezentitaj de Heinz Knobloch. Ĝi aperis en „Buchverlag der Morgen" jam en pluraj eldonoj. La libron vi certe povas pruntepreni en ĉiu biblioteko.
— Viaj tradukoj estu maŝieskribitaj sur formato A4 (1 paĝo = 30 linioj

po 60 tajperoj) en kvar ekzempleroj.
— Partopreni povas unuopuloj kaj kolektivoj.
— Ne rajtas partopreni membroj de la Centra Estraro kaj ĵurianoj.
— Oni povas partopreni ankaŭ per pluraj tradukaĵoj.
— La redakcio rajtas publikigi viajn tradukojn.
— Oni premios la plej bonajn.
— La konkurso estas anonima, tial subskribu viajn tradukaĵojn per kaŝnomo. Aldonu fermitan koverton sur kiu troviĝu la kaŝnomo. En la koverto estu viaj ĝusta nomo kaj adreso.
— Sendu ĉion al:
Dieter Berndt, Berolinastr. 2
Berlin, 1020
— Findato: 30. 9. 1987

HOÚ ĜIPING:

Esperanto-movado en la nuna Ĉinio

Tuj antaŭ la 71-a UK, por koni la progreson de la ĉina Esperanto-movado en la lastaj jaroj, la redakcio de „El Popola Ĉinio" faris enketon pri la lokaj Esperanto-organizoj de Ĉinio. La enketo montris, ke ekde 1979 la ĉina Esperanto-movado vigle disvolviĝis kaj malfermis novan paĝon en sia historio. Nun ekzistas la landaj Esperantaj organizoj la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la societo Amikoj de Esperanto. Escepte de Tibeto kaj Gujĝoú-provinco, la ceteraj 27 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj jam havas sian provinnivelan Esperantan asocion (aŭ ligon). La plejparto de la provincaj ĉefurboj kaj gravaj urboj de Ĉinio havas siajn Esperantajn societojn. Ĝis la fino de aŭgusto 1986 estis sume 80 tiaj organizoj. Krome, fondiĝis ankaŭ 25 guberniaj Esperantaj societoj.

En Ĉinio multaj junuloj lernas Esperanton. Aperis en 9 urboj societoj de junaj esperantistoj. Veterana esperantista asocio fondiĝis antaŭ nelonge en Pekino. Krome estas 13 fakaj Esperantaj organizoj, kiaj medicina, fervoja, trafika k. a. Ĉio tio montras, ke la ĉina Esperanto-movado nun profundiĝas en la socio.

De 1979, 57 institutoj kaj universitatoj funkciigas Esperanto-kurson. Inter ili estas enlande famaj altlernejoj, kiel la Orient-Ĉina Instruista Universitato, Centra-Ĉina Instruista Universitato, Pekina Fremdlingva Instituto, Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Ĝjinan-universitato, Ŝjamen-a Universitato, Fudan-universitato, Siĉúan-a Universitato, Uhan-a Universitato, Ĉina Scienc-teknika Universitato k. a. Laŭ statistiko, 5 000 studentoj lernis kaj lernas nian lingvon.

En la tuta lando funkcias 33 Esperantaj korespondaj lernejoj aŭ kursoj kun 400 000 homoj.

En Ĉinio estas pli ol 20 Esperantaj aŭ ĉina-Esperantaj gazetoj (tipografie presitaj), el kiuj estas „La Mondo", „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj", „Amikoj de Esperantoj", „Voĉo de Esperanto", „Lernado de Esperanto", „Esperantisto", „La Espero" k. a. Lokaj Esperantaj organizoj eldonas pli ol 200 organojn kun riĉa enhavo (mimeografe).

Estas unu provinca kaj ses urbaj radiostacioj kiuj funkciigas Esperanto-kurson. Ankaŭ la Ĉinghaj-a Televidstacio havas sian E-kurson.

En la lastaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis ĉ. 70 titolojn de libroj kun eldonkvanto de 700 000 ekzempleroj. Lokaj eldonejoj, Esperantaj asocioj kaj Esperantaj korespondaj lernejoj eldonis ĉ. 120 titolojn de libroj kun eldonkvanto de 3 000 000 ekzempleroj. Ĉio tio estas senprecedenca en la historio de la ĉina Esperanto-movado.

(El „El Popola Ĉinio" 12/86)

Oranĝa ombrelo. Noveletoj.

Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1986, 148 p.

Jen salutinda daŭrigo de „Bukedo al Vi", eldonita en 1984 de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

La nova libreto enhavas 40 „mikronovelojn", temantaj pri amo, laboro, burokrataj superuloj — pri ĉiutagaĵoj do. Kaj samtempe ankaŭ ne — ĉar certe ne nur por mi priskribo de la vivo de simplaj homoj en facilaj kaj tamen enhavoplenaj epizodoj iel estas nova ekscio. Precipe ankaŭ pro tio,

ĉar sen rimarki tion konscie, tiu libreto, kiu — laŭ mi — estas bona legaĵo ankaŭ por komencantoj, donas lecionon.

Lecionon ne nur pri homoj, sed ankaŭ pri la arto de simpla kunvivado.

Denove al la legantaro estas prezentata libro, kies grafika eksteraĵo kaj interno estas faritaj vere profesinivelaj. Esence nenion riproĉindan rilate la lingvaĵon mi trovis.

Tiuj novaj „mikronoveloj" trovos sian legantaron, same kiel ili (laŭ la antaŭparolo en „Bukedo al Vi") en Ĉinio estas ŝatataj de pli kaj pli da homoj.

Rolf Janke

Letero el Soveta Unio pri „Verda alfabet-supo"

La nomo de s-ro Bernard Golden estas sendube konata al ĉiu esperantisto. Torento de liaj artikoloj inundis ĉiujn gazetojn kaj eldonejojn de Esperantujo kaj nun jam ne eblas trovi periodaĵon, kiun ne konkeris lia vigla plumo. Nun li regalas nin per „Verda alfabet-supo". [der esperantist, 4/1986] Kutime ni ricevas sufiĉe sekan menuon, do dekomence tuj aperas apetito kaj antaŭsento de plezuro. La nedigesteblon de tiu supo oni eksentas nur poste.

Do ni sekvu la rezonadon de B. G. Al li ne plaĉas ofta uzado de mallongigoj, kaj li eksklamacias: „Eĉ kiam oni legas la inicialojn en kunteksto, ili restas kriptaĵo . . ." kaj donas ekzemplojn: DDR, Nr., ISSN, Pf., GDR ...

Por ni tamen (por ne esti subjektiva, ni enketis kelkajn samideanojn) ĉiuj ĉi mallongigoj absolute klaras eĉ sen kunteksto. Ĉiu e-isto, atinginta kulturan nivelon sufiĉan por legi periodaĵojn, sendube scias, kio estas UEA, SAT, TEJO, PIV, PAG, kion signifas la litero Z. post iu citaĵo. Ĉiu konstanta leganto de „der esperantist", eĉ neniam vizitinta GDR-n, klare komprenas signifon de literoj CLR, KL, GDREA. Kaj kontraŭvole enŝteliĝas timiga suspekto: se s-ro Golden ne scias, kio estas GDR, USSR kaj ĈSSR — ĉu li vere estas tiom malsaĝa aŭ nur klaŭnas? Ankoraŭ unu brila konkludo: . . . apud la vere internaciaj, poŝtaj kaj aŭtomobil-numer-plataj (kia monstra vortaĵo! — V. M.) mallongigoj troviĝas aliaj neinternaciaj formoj: jen du duoblaĵoj: CS: ĈSSR, SU: USSR." Ĉu iu kredus, ke tio estas dirita serioze? La mallongigoj kiel SU, CS, H, D, B k. s. estas (eble) internaciaj por vojaĝemaj aŭtomobilistoj kaj por poŝtoficistoj, sed por ordinara homo — apenaŭ deĉifreblaj, se ili ne signas lian propran landon. Tamen USSR, GDR, FRG, ĈSSR estas oficialaj nomoj de landoj; se (imagu nekredeblan) iu neniam vidis la literojn „USSR" — ĉu la longega „Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj" estas por li pli informa? „der esperantist" havas negrandan amplekson kaj la paĝospaco en ĝi tre valoras. Se ni evitos nebezonatajn klarigojn kaj multfojan ripetadon de samaj vortkombinoj — ni ŝparos lokon por bonaj, interesaj artikoloj, aŭ almenaŭ anoncoj.

Mi finos denove per gastronomiaj analogioj, tiom ŝatataj de s-ano Golden. Diversaj homoj havas diversajn gustojn, tamen mi ĝis nun renkontis neniun, kiu propravole preferus jam dismaĉitan, sensalan kaj ĝenerale sengustan manĝon. Tian konsumas nur malsanuloj kaj, evidente, sen plezuro. Eble tamen, kelkaj el ili, pro nigra envio al sanaj stomakoj, penas trudi sian dieton al la tuta mondo . . .

Valentin Melnikov, Moskvo

Kvina ISEU en Veliko Târnovo invitas vin

De la 11-a ĝis la 17-a de julio 1987 en Veliko Târnovo — iama ĉefurbo de Bulgario, en la loka universitato „Kiril kaj Metodij", okazos KVINA INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO.

Celo: plialtigo de la ĝenerala kulturo kaj lingva nivelo de la partoprenantoj.

Prelegos eminentaj bulgaraj kaj alilandaj sciencistoj kaj specialistoj-esperantistoj.

Limdato por aliĝo: 15. 6. 1987. Validas la poŝtstampo.

Aliĝkotizo por fremdlandanoj — 120 levoj, kiu estos pagebla surloke al la Organiza komitato. Ĝi inkluzivas: loĝadon, trifojan ĉiutagan manĝadon, samkiel la prezojn de interkona kaj adiaŭa vesperoj kaj tuttaga eksterdistrikta ekskurso. La aliĝkotizon ni akceptas nur por la tuta tempodaŭro de la aranĝo.

Loĝado kaj manĝado — en la studentaj hejmoj de la universitato.

La Organiza komitato de la V-a ISEU certigas 100%-an rabaton al tiuj volontuloj, kiuj entreprenas kunigi 10 personajn grupojn kaj gvidi ilin al Veliko Târnovo. (La gvidanto devas esti la 11-a.)

La programo de la aranĝo aperos fine de aprilo.

Aliĝilojn bonvolu peti de:

Bulgara Esperantista Asocio
P. K. 266
BG — 5000 Veliko Târnovo
BULGARIO

Organiza komitato

TUSE '86

TUSE (Turisma Semajno) estas belega unusemajna renkontiĝo de turistoj kaj naturamikoj kaj okazis julie 1986 tradicie en la Slovakia Paradizo. La inviton de Slovakia Esperanto Asocio sekvis ĉirkaŭ 80 geamikoj de migrado kaj de amuzado. Ili alveturis el ses ŝtatoj, inter ili ankaŭ 18 gepartoprenintoj de GDR. Kun migrogrupoj de diversaj malfacilecoj ili konatiĝis kun la belecoj de Slovakia Paradizo kaj admiris la nekompureblan protektitan naturparkon.

La karakterizaĵo estas la profundaj, mallarĝaj kaj apikaj kalkŝtonaj kanjonoj, kiujn trafluas malvarmaj kaj kristale puraj riveretoj kaj torentoj, celantaj la riveron Hornád. La plej multaj kanjonoj estas malfermitaj por

la turisma publiko. Multkosta instalaĵo, konstruita kun granda sento por konservado de la romantika pejzaĝokaraktero, kondukas la turistojn sur unikaj irejoj kaj ofte super kradoj aŭ per feraj eskaloj tra la ravinoj kaj abismoj al nekutimaj rigardoj al akvofaloj.

Ĉiuvespere okazis interesaj aranĝoj (amuzvesperoj, lumbildoj, konkursoj).

Aŭtobuse ili ankaŭ vizitis la urbon Levoĉa, la unikan Glacian Groton de Dobŝina kaj konatajn lokojn de Alta Tatro.

Esperanto denove pruvis sian taŭgecon por la internacia interkomunikiĝo. Koregan dankon al la prudentaj organizintoj!

TUSE estas rekomendinda! **Andreas Höpfner**

Dua fremda lingvo en Ĉinio

En 1986 sep ĉinaj altlernejoj decidis elekti Esperanton kiel duan fremdan lingvon nepre lernantan de tiuj esplor-studentoj, kiuj aspiras magistrecon. Ili estas la Centr-Ĉinia Instruista Universitato, la Human-a Universitato, la Orient-Ĉinia Instruista Universitato, la Hubej-a Instruista Instituto, la Tjanĝin-a Fremdlingva Instituto kaj la Anhuj-a Universitato.

[El „El Popola Ĉinio" 12/86]

Abonu la gazeton „Saksa Kuriero"!

De post pli ol du jaroj la Distrikta Estraro Leipzig de GDREA eldonas la esperantlingvan gazeton „Saksa Kuriero", kiu nun estas legata en 50 landoj de la mondo. Ĉu vi jam abonis ĝin? En preskaŭ ĉiuj distriktoj de GDR ekzistas perantoj de „Saksa Kuriero" (demandu vian Distriktan Estraron!) Vi ankaŭ povas rekte aboni ĉe

Literatura Sekcio
p/a Helga Beau
P.O. p.k. 713
Leipzig
7010.

La gazeto estas kompostita kaj presita per modernaj teknikaj rimedoj kaj enhavas multajn informojn pri GDREA kaj tutmonda Esperanto-movado. Jarabono (por ses numeroj) kostas 5 markojn. Eksterlandaj abonemuloj turnu sin al **Centra Estraro de GDREA, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080.**

9aj Turismaj Tagoj en Žilina

En la tagoj 2. 8. 8. 1987 renkontiĝos en Žilinà (Ĉeĥoslovakio) turistoj kaj naturamikoj el diversaj landoj dum la 9-aj Turismaj Tagoj. La partoprenontoj loĝos en studenta hotelo en 2- kaj 3-litaj ĉambroj kun necesejo kaj lavejo. Ili vizitos la plej belegajn regionojn de la montaroj Malgranda Fatra (kun fama Vrátna-valo) kaj Sulóv-rokaro, kie okazos tuttagaj piedekskursoj en 3 kategorioj: A — pretendemaj ekskursoj por bonaj turistoj, B — mezmalfacilaj ekskursoj, C — promenoj en la naturo por pli aĝaj naturamikoj kaj familioj kun malgrandaj infanoj. Krome estas preparite unu tuttaga busekskurso, rostado de lardo kaj vesperaj amuzprogramoj. La partoprenkotizo estas 490 Kčs por enlandoj kaj 590 Kčs por eksterlandaj partoprenantoj. Estas eble mendi matenmanĝojn, vespermanĝojn kaj 2 tagmanĝojn sume por 200 Kčs. Detalajn informojn kaj aliĝilojn petu ĉe: Inĝ. Juraj Gondžúr, Levočská 3, 010 08 Žilina, ČSSR.

Supraphon-disko en Esperanto

La konata ĉeĥa sondiska firmao Supraphon en 1986 eldonis mallongdaŭran diskon (single) kun 4 kanzonoj vakermuzikaj de la Country-grupo „Barbuloj" (Stacidomo, Johny, Ĉielvakeroj, Vespero proksimiĝas). Al la grupo apartenas Petr Nýdl, Martin Černy, Eda Knopek, Zdeněk Smolik, Láda Vojta, Ludêk Koutny, Zdeněk Neumann. La disko estas havebla pere de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, Praha 1, ČSSR aŭ pere de viaj ĉeĥaj korespondantoj.

Ni aĉetos por la arkivo

Nia Centra Estraro de GDREA posedas pliampleksiĝantan arkivan bibliotekon. Por pluevoluigi ĝin, ni aĉetas kompletajn kompletojn de Esperanto-kolektajoj, biblioteketoj kaj simile.
Kontaktu GDREA: Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Otto-Nuschke-Str. 1, Tel. 2 82 63 43, Berlin, 1080.

Jugend-Wochenendseminar in Köthen

In Köthen findet vom 29. — 31. 5. 87 ein Jugendseminar statt. Die Veranstaltung umfaßt Sprachkurse für Anfänger und Fortgeschrittene. Für Übernachtung, Verpflegung und die Lektoren wird ein Beitrag von voraussichtlich 25 — 30 M erhoben. Anfragen und Anmeldungen an B. Kuse, Str. d. Thälmannpioniere 53, Köthen 4370.

Die Quelle der UNESCO-Resolution
La fonto de la UNESKO-Rezolucio

Če gravaj dokumentoj preciza fonto-indiko estas aparte necesa. Jen la fonto-indiko por la rezolucio de UNESKO 23 C/Res. 11.11. UNESCO: Records oft he General Conference 23. Sessions, Sofia, 8th of oct. to 9th of nov. 1985, vol. I, Resolutions, Sofia 1986, p. 68.
Der deutsche Text der UNESCO-Resolution ist erhältlich beim Bezirksvorstand des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, Geiststraße, Halle 4020 oder bei GDREA.

Nova Ovo: ĉu longe?

Kiam aperis en Jugoslavio la nova revuo „Ovo", mi admiris la redaktoron Slavko Šimunić pro lia kuraĝo. Denove Esperanto-revuo, ĉu ĝi vivos longe? La demando ne estas teoria. Sed unue pri la enhava profilo

de la revuo kaj poste pri eventuala ŝanco por la estonteco.
Kiel oni legas, temas pri „Internacia gazeto por distro kaj amuzo", kiu devus aperi verŝajne 15foje jare. Ĝi estas A-4-formata kaj 12paĝa por numero. „Ovon" eldonas Kroatia Esperanto-Ligo en Jugoslavio. La celo de la revuo estas ĉefe disponigi al la junularo esperantista aŭ „junulemaj" homoj amuzan iom klerigan kaj precipe facile digesteblan legaĵon, kiu prezentu la „buntan mondon", ne traktu tro komplikajn analizojn. La vortmaterialo baziĝas je la 500radika listo, kiun ellaboris Zagrebaj esperantistoj. Laŭ tiu ĉi listo oni verkis lernolibron kaj legomaterialojn, eĉ romanojn. Aparte bonvena la materialo devus esti, laŭ la espero de la redakcio, por Esperanto-lernantoj en lernejoj.
Trarigardinte la unuajn 6 numerojn de 1985 (aliajn numerojn mi ne havas; ĉu la revuo ankoraŭ aperas?), mi konstatis vere grandan multflankecon. Oni trovas artikolojn pri nova teatro (koresponda teatro), scienc-fiksiajon, satirajojn (tre belajn pri la fumado), enigmojn, tro da mezkvalitajn bildstriojn, ŝakrubrikon kaj la belan krimromanon de J. Valano „Gerda malaperis".
Do tute interesa revuo. La demando nur estas, ĉu ni povas permesi al ni la lukson de samtempa ekzistado de „Juna amiko", „Kontakto", „Ovo" kaj „Monato", kiuj ĉiuj iel entenas materialojn troveblajn en ĉiuj menciitaj revuoj. Verŝajne ankoraŭ necesas pli forte pripensi kiel atingi veran unikecon. Ekzemple mankas plene satira revuo en Esperanto. Jam longe pasis la tempoj de la „Pirato". Se „Ovo" povus fariĝi nova „Pirato", kiu satirus pri la movado same kiel pri la malperfektajoj de la mondo, eble „Ovo" ovadus kaj movadus, kion mi deziras.

D. Blanke

Ni funebras pro

— la forpaso de la iama laborista esperantisto August Maier el Berlin, la 8an de decembro 1986

Junulara Renkontiĝo en Bernburg

Renkontiĝon por junaj esperantistoj, kiu okazis dum la semajnfino de la 17-a ĝis la 20-a de oktobro 1986, organizis Distrikta Estraro Halle de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR kunlabore kun Subdistrikta Estraro Bernburg. Krom GDR-anoj la aranĝon partopernis 11 gejunuloj el Pollando.

La kulmino de la aranĝo okazis sabate antaŭtagmeze. En nova kvartalo de Bernburg, apud ĉefa promenejo, la urbo konsilio disponigis al la esperantistoj terenon, sur kiu ĉiuj komune plantis arbojn. La plej videbla el tiuj arboj, ĝi estas fago, ricevis memorŝtonon kun la surskribo „arbo de amikeco – 100 jaroj de Esperanto – 1887 – 1987" (vd. foto p. 36). La loĝantaro el la ĉirkaŭaj domoj helpeme subtenis tiun agadon disponigante multajn sitelojn da verŝakvo, por ke„ iliaj" arboj estonte beligu la loĝkvartalon.

Posttagmeze ni vizitis la memorejon en la psikiatria malsanulejo, kie oni prezentis al ni la terurajn kaj nesciencajn „kurac"-metodojn de la pasinta jarcento kaj la kruelaĵojn de la faŝistoj, kiuj tie gasmortigis kaj forbruligis dekmilojn da senkulpaj homoj. Dum la rigardado de la urbo kaj kastelo oni povis konstati, ke la relative nekonata, sed historia kaj bela urbeto kun 50 000 loĝantoj estas vidinda.

Dimanĉe per luita veturilo ni veturis al la montaro Harz, kie per telfero ni suprenveturis al la „Sorĉistina Dancejo". Poste ni vizitis la groton „Hermannshöhle".

La vesperoj kun kantado, babilado kaj diskoteko estis tre gajaj kaj longaj. Adiaŭante la partoprenantoj esprimis sian kontenton dankante por la la bona organizado.

Hans-Peter Bartos

Recenzo

Pettyn, A.; Wójcik, A.: mini rozmówki esperanckie. Wiedza Powszechna, Warszawa, 1986. 95 paĝoj.

Laŭ la endonduko (p. 5—6) la konversacia minilibreto estas destinita por polaj turistoj, kiuj intencas partopreni internaciajn renkontiĝojn de esperantistoj, sed ne plene aŭ eĉ ĝenerale ne regas la internacian lingvon Esperanto. Pro tio la aŭtoroj enkadrigis en la minidialogaron ankoraŭ plejmini-gramatikon (p. 12—14). La unuopaj ĉapitroj de la dialogaro liveras frazojn (plejparte demandojn) kaj vortojn laŭ 18 tipaj ĉiutagaj situacioj (ekz. aĉetado, medicina helpo, je limstacio). Sed . . .:

1. Ne evidentiĝas la elektro-sistemo, laŭ kiu fine de difinitaj ĉapitroj estas ripetataj aŭ nove enkondukataj vortoj, ĉar kelkaj el ili jam estas aplikitaj en la antaŭaj dialogfrazoj. [EKZ en la dua ĉapitro p. 17—20] sur la paĝo 20 estas listigitaj 11 vortoj, el kiuj 6 jam troviĝis en la dialogteksto.)
2. Ĉu la mondo jam tiomgrade „verdiĝis", ke preskaŭ ĉie, almenaŭ laŭ la konvinko de la aŭtoroj, troviĝas esperantoparolantoj, kiuj samtempe ankaŭ regas la polan lingvon? Alimaniere ne estas interpreteblaj, kompreneblaj frazoj de tipo:

„Bonvolu alvoki ambulancon!"
„Ĉu vi estas asekurita? (p. 40)
„Bonvolu lavi la aŭtomobilon.
Kiam tio ĉi estos preta?"
„Post mallonga atendotempo." (p. 38/39)
„Bedaŭrinde, mi ne parolas esperante"
„Ĉu vi parolas esperante?" (p. 17)

3. Kelkaj vortoj kaj formoj povus elvoki kaposkuon, ĉar ili ne garantias la atenditan flanke de la demandanto komprenon ĉe la eksterlanda partnero, ekz. „milicejo" (p. 20), kvankam en la teksto aplikatas la esprimo „policejo (p. 18); kiom mi pagas? (p. 55) — ĉu la demandito, taksiŝoforo, allasas al la kliento la finfinan decidon?

Tamen . . .:

Enestas en la mini-dialogaro paŝoj en la — laŭ mia opinio — ĝuŝta direkto: Frazoj de la tipo „Bonvolu demandi, ĉu ĝi (la taksio) estas libera!", „Bonvolu diri al li, ke mi volas veturi al la strato . . .)" respegulas la realan vivon en esperantista medio. Oni nur devus imagi, ke helpema esperantisto-eksterlandano akompanas, gastigas la polan turiston kaj per Esperanto helpas al li en difinitaj situacioj.

Do: Pri la metodika konstruo, koncepto, de konversaciaj libroj ĝenerale gravas kaj valoras diskuti, ne nur surkampe de Esperanto, sed ankaŭ surkampe de etnaj fremdaj lingvoj, ĉu?

d-ro T. Dahlenburg

PoSET '87

Nia 2-a PoSET sukcese okazis kun 73 geamikoj el 5 landoj. La esperantistaro de la distrikto Potsdam denove invitas esperantistojn, kiuj jam parolas la internacian lingvon.

De la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1987 vi povos tranokti en junulara gastejo Pirschheide. Ni preparos interesan programon, kaj vi povos perfektigi vian parolkapablon.

Interesuloj tuj skribu al s-ino Brigitte Raabe, Sulzbacher Steig 1, Staaken, DDR — 1546.

HELPO PETATA POR NIKARAGVO

Por pli sukcesa disvastigo de la E-movado, la esperantistoj en Nikaragvo bezonas helpon: lernolibrojn kaj lernilojn, librojn, gazetojn ktp.

Via helpo estos esprimo de amikeco kaj solidareco kun la nikaragva popolo.

Sendaĵojn adresu al: Nikaragva Esperanto-Asocio, Aptdo. 3912, MANAGUA.

PARTOPRENU PORPACAN FORESTAN MITINGON!

Lernejana E-klubo „Stelo de l'Espero" (USSR) planas kun ekun la klubo de internacia amikeco, kies sekcio ni estas, aranĝi aprile-87 internacian forestan porpacan mitingon. Ni petas diversaĝajn pacbatalantojn el ĉiuj landoj sendi al ni leterojn, afiŝojn, broŝurojn, bk kaj aliajn materialojn por ekspozicio aŭ laŭtlego dum la mitingo. Reciproke ni povas sendi porpacajn broŝurojn en Esperanto kaj en la angla, ankaŭ bk pri Sovet-Unio.

Temoj por leteroj:

— mia rilato al „strategia defenda iniciato" de Reagan;
— mia rilato al Deklaro de Gorbaĉov (1986.01.15);
— mia opinio pri persona homa partopreno en pacbatalo;
— infanoj kaj paco (ĉu la interligo pasiva aŭ aktiva?);
— kion mi persone volas kaj povas fari por la paco?

Bonvolu tuŝi laŭdezire unu, kelkajn aŭ ĉiujn temojn. Limdato de la forsendo al ni — fino de la marto-87.

Nia adreso: USSR 454 000 Ĉelabinsk, Aloje pole, Dvorec pionerov, Esperanto

Vicki Baum: Amo kaj Morto en Balio, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1986; trad. el la germana: P. H. Mooij; 420 p.

V. Baum (1888—1960) estas unu el la plej sukcesplenaj aŭstraj aŭtorinoj de altnivela poramuza literaturo. Ŝi verkis multnombrajn novelojn, rakontojn kaj pli ol 30 romanojn, el kiuj multaj estis filmigitaj kaj tradukitaj en aliajn lingvojn. Estas ĝojige, ke per „Amo kaj Morto en Balio" (1937) unu el ŝiaj verkoj estas alirebla nun ankaŭ por la internacia esperantlingva legantaro.

La romano baziĝas sur reala okazaĵo, kiu apartenas al la plej tragikaj eventoj de la balia historio: en 1904 ĉina velŝipo surrifiĝis ĉe la suda marbordo de Balio kaj partoj de la kargo estis albordigitaj. Laŭ tradicia leĝo la insulanoj rigardis tiujn kiel alnaĝaĵon kaj pro tio sian proprаĵon. La ĉina proprietulo de la ŝipo tamen akuzis la balianojn ĉe la nederlandanoj pri rabado. Por la nederlandaj koloniaj regantoj, kiuj ĝis tiam administris nur la nordan parton de la insulo kaj celis al kolonia ekspansio, tio estis konvena preteksto. Ili deklaris militon kontraŭ la princo de Badung kaj komencis „punekspedicion", dum kiu kelkaj miloj da nederlandaj soldatoj post mallonga tempo venkis la balianojn, kiuj estis armitaj nur per lancoj. Kiam la nederlandaj trupoj atingis la palacon de la princo, ties familio, servistaro kaj multaj aliaj enloĝantoj de la princlando sin memmortigis por eviti hontegigan malvenkon. Tiu okazaĵo sigelis la finon de la libereco de suda Balio kaj komencis la enordigon de la tuta insulo en la nederlandan kolonian imperion.

V. Baum rakontas al ni pri tiu periodo de balia historio kiel konantino de Indonezio kaj ĝiaj loĝantoj. Ŝi majstre interligas ekscitan agadon kun detala priskribado de la medio. Kvankam „Amo kaj Morto en Balio" ne estas historia romano, ni multe lernas pri la historio, religio, vivmaniero kaj la kulturo de la balia popolo. **Amo sur** Balio — tio estas la rilato de la servistino Muna al sia mastrino; — tio estas la sentoj de la

diligenta rizkamparano Pak al sia unuenaskita filo; — tio estas la kialo por Puglug, kuniri kun sia edzo, kiam tiu malsaniĝas je lepro kaj pro tio estas forpelata el la komunumo; — tio estas la motivo por la bela Sarna kripligi sin por ne fariĝi kromvirino de la maljuna reĝo sed resti ĉe la amanto; kaj amo estas ankaŭ la kaŭzo por la tragedia sorto de Meru, kiu „maldece levis siajn okulojn al virino de la princo" kaj pro tio estas blindigata. **Morto** sur Balio — tio kaŭzas por la parencoj ne nur malajecon, sed ankaŭ zorgojn ricevi la necesan monon por la funebra ceremonio, kiu estas la kondiĉo por iutaga renaskiĝo; — tio estu la sorto ankaŭ de la vidvinoj ĉe la forpaso de la edzo; — kaj finfine tio estas la amasa sinoferado „puputan", kiu al la princo ŝajnas esti la ununura eliro ĉe la alveno de la nederlandaj soldatoj.

„Amo kaj Morto en Balio" estas facile kaj flue legebla romano. La traduko estas klara plenspegulas la esprimpovon de la aŭtorino-metaforoj kaj komparoj estas tradukitaj en bildojn, kompreneblajn kaj imageblajn por la internacia legantaro. Priskribi la vivon de la balianoj necesigas la enkondukon de vortoj, nekonataj al la ĝenerala leganto en la eksterazia mondo. La tradukinto prudente agis uzi tiun nekutiman leksikon ĉefe en originallingva formo kaj klarigi ĝin per glosaro fine de la libro. Kritika rimarko koncernu sole la titolon: konsiderante, ke Balio estas insulo, laŭ la opinio de tiu ĉi recenzinto ĝi korekte devus teksti „Amo kaj Morto **sur** Balio" — konforme al la originala verko „Liebe und Tod **auf** Bali".

„Amo kaj Morto en Balio" estas leginda romano por la ŝatanto de vera rakontarto; romano, kiu konatigas kun la kulturo kaj historio de malproksima insulo, kiu intimigas kun la sentoj kaj deziroj de fremda popolo, sed kiu meze de paradiza pejzaĝo malkaŝas ankaŭ socian maljustecon kaj la malhumanecon de kolonia subpremado. Kiu legis tiun libron, konas Balion. Balio, kie amo ĉeestas kaj ankaŭ morto. **Sabine Fiedler**

Koutny, Ilona (red.): Perkomputila Tekstoprilaboro.

Budapest: Scienca Eldona Centro 1985.

336 pĝ.

La kolekto „Perkomputila Tekstoprilaboro" enhavas 21 kontribuajojn pri la vasta kampo de teksto- kaj lingvoprilaborado:

— Parolprilaborado
  problemoj de parolsintezo kaj parolrekono speciale en hungara, pola, franca lingvoj
— automata lingvoprilaborado
  Tiuj ses artikoloj, inter tiuj du de GDR-sciencistoj, okupiĝas emfaze pri la sintaksa analizo de diversaj lingvofamilioj germana lingvo, ĉina lingvo, aglutinaj lingvoj).
— perkomputila tradukado
  Estas prezentataj la traduksistemoj SUSY (Universitato Saarbruecken, FRG) kaj ARIANE-78 (GETA, Francio), krome la projekto DLT (BSO Utrecht, Nederlando).
— Komunikado Homo-Maŝino
  Tiu parto enhavas la priskribon de la informretrovaj sistemoj FAS-80 (GDR) kaj DIALOG (Pollando).

La plejmulto el tiuj kontribuoj tre detale traktas kaj teoriajn principojn kaj praktikajn laborrezultojn kaj spertojn de enkondukado. Ampleksaj bibliografioj, grafikaĵoj kaj multaj modeloj (komputilaj preslistoj) servas al kompreneblo kaj kompakteco.

Michael Lennartz

Rüdiger Eichholz (Redaktinto),

Akademiaj Studoj 1986. Bailieboro

(Ontario): Esperanto-Press, 298 S.

Ĉi-tiu volumo estas jam la kvara eldono de la serio „Akademiaj Studoj", kiun redaktas Rüdiger Eichholz el Kanado. (Kp. la recenzon de E. D. Krause en „der esperantist" 3/86.) La volumoj precipe enhavas represaĵojn de materialoj aperintaj en diversaj Esperanto-periodajoj, sed ankaŭ originalajn kontribuojn.

La jam kvara volumo (1986) enhavas antaŭ ĉio materialojn pri jenaj problemoj: landnomoj (A. Albault, R. Eichholz, B. Golden, G. Kamaĉo, K. Perko), terminologio (Wera Dehler — nun Wera Blanke, R. Eichholz, B. Golden, M. Halvelik, J. Werner), neologismoj (A. Albault, Vilma S. Eichholz). Krome enestas kontribuoj pri ata — ita (R. Eichholz, O. Reiersøl, Aŝvinikumar) kaj ‚komputilo' (R. Eichholz). Interesaj estas ankaŭ la studoj traktantaj la hiaton (A. Albault), la radikon ‚komun-' (B. Golden) kaj la verbosubstantivojn (D. Portmann) k. a.

La serio mem estas interesa fenomeno. Eichholz volis stimuli la akademianojn kaj (aliajn) esperantologojn diskuti kaj diskutigi lingvajn problemojn. Tiu celo respondas al vera bezono. Sed en la prefaco al la volumo 1986 li iom rezignacie konstatas, ke nur malmultaj reagis al kontribuoj aperintaj en antaŭaj volumoj. Freŝajn materialojn nur sendis A. Albault kaj B. Golden. Li atendis pli aktivan partoprenon flanke de akademianoj, kvankam la volumoj mem — malgraŭ la iom pompa titolo — tute ne estas oficiala eldonaĵo de la Akademio de Esperanto kaj ofte ne respondas al la nivelo de akademiaj diskutoj (almenaŭ laŭ nacilingva akademia nivelo). Tamen, la volumoj estas valoraj arkivoj, ĉar multaj interesiĝantoj ne havas facilan aliron al la diversaj fontaj periodaĵoj de la kontribuoj.

Interesa estas la sinteno de Eichholz al la Akademio.

Li mem estas Akademiano, nome la „Direktoro de la Terminologia Centro de ISAE kaj de la Teknikaj Vortaroj de la Akademio de Esperanto". Sed mi havas la impreson, ke la akademianoj ne tro bone komprenas sian komunan respondecon pri la evoluo kaj evoluigo de la faka lingvo kaj lasas la direktoron iom soleca. Ne povas sufiĉi por tia taskego unu tre diligenta homo, tre fore kaj nordpolus-proksime loĝanta en Kanado . . .

La tuta Akademio devas subteni seriozan okupiĝon pri tiu demando . . .
La mankon de akademia eĥo Eichholz prave priplendas kaj mem ŝanceliĝas rilate al sia sinteno pri la Akademio:
„La problemoj, kiuj ĝenas multajn esperantistojn, tial ankaŭ estonte restos nesolvitaj, ĉar la granda plimulto de la homoj elektitaj por gardi la evoluon de nia lingvo, ne penis prezenti siajn vidpunktojn, sed preferis ŝajnigi, ke ĉio jam estas solvita kaj en bona ordo. Do ne miru, ke ankaŭ mi nun aliĝis al la homoj, kiuj pridubas la utilon de nia institucio" (p. 1).
Mi demandas, ĉu vere la akademianoj entute havas imagon pri la necesa aŭ ebla rolo de lingva institucio de planlingvo? Mi forte supozas, ke ne la funkcio de la Akademio estas neklara. La kriterioj por akademianiĝo estas dubindaj. La esperantologia kompetenteco de multaj membroj estas dubinda. Ŝajnas al mi, ke la 100jara Esperanto ne tre longe povas permesi la si la lukson de nekompetenta pseŭdoscienca institucio, kiu komplete ne volas lerni ekzemple de la mondvasta fenomeno de lingva planado, afero, kiu devus ege interesi ĝin.
Do laŭ mia opinio jenaj aferoj estus solvendaj rilate al la Akademio:

a) klarigo pri la nuntempe bezonata rolo kaj funkcio de la Akademioj,
b) elekto de prioritataj problemoj, kiujn la Akademio sisteme esploru, respektive esplorigu,
c) konkludado el la esploroj kaj verkado de taŭgaj rekomendoj,
d) kreo de vera aŭtoritato de la Akademio, almenaŭ ĉe la ĉefaj influantoj de la lingvouzo, ekz. ĉe redaktoroj, lektoroj, leksikologoj, literaturistoj, radioparolistoj k. a.

Nuntempe tro multaj lingvouzantoj ludas aŭ faras kion ili volas. Jen la kverelo pri komputilo — komputoro daŭras, iuj modas pri re-ĥo-igo ĉe vortoj, kie jam longe enradikiĝis k (mi legas ‚teĥniko', ‚ĥemio', kaj — plej bele — eĉ pri ‚ĥomo' en iuj bulgaraj presajoj, bela influo!). Nagata Akiko volas ĉion skemigi. K. Piĉ, ankaŭ „akademiano" inventas propran dialekton (kaj oni eĉ laŭdas tiun stultaĵon). Eĉ la prezidanto de la Akademio, kiu devus esti plej sentema pri tradicioj, lezas la Fundamenton, ekz. enkondukante novan literon „w"en ‚westo' (= okcidento) en „Ni kaj Li" (esearo omaĝe al Waringhien, vidu „der esperantist" 5/86, p.) aŭ piĉumas per ‚erste' (p. 37).
J. Pióro el Pollando eldonas „Fundamento de kemia nomenklaturo" kaj nomas tion megalomanie „Esperantaj Normoj — Kemio — N-ro 1) tiel montrante, ke li komplete ne scias, kio estas normo, kiu rajtas normi k. s. luj simple ŝanĝas la nomon de la lingvo, evitante uzi la terminon „Esperanto" sed nur parolas pri „Internacia Lingvo" aŭ „Ilo", kiel prof. Frank. Kaj tio (preskaŭ) neniun ĝenas (?). Rikardo Ŝulco manias pri tradukado de propraj nomoj, kiuj tiel fariĝas „malpropraj".
Oni povus daŭrigi citante disvastiĝon de danĝera diletantismo. Samtempe oni klopodas klarigi al lingvistoj, ke Esperanto estas serioza afero, bone evoluas, estas stabila k. t. p.
Kiun opinion pri ĉio ĉi havas la „lingva institucio" de la Esperanto-komunumo, do Akademio? Mi ne scias, kvankam mi iom orientiĝas en la interlingvistika kaj esperantologia literaturo.
Oni jonglas per pompaj esprimoj kiel ‚internacieco', ‚facileco', ‚reguleco', ‚logiko', (Ŝulco) sed ne difinas ilin, ne funde esploras.
Eichholz skribas „Do ekzistas ankaŭ aliaj kolegoj, kiuj opinias, ke ni devus gvidi la evoluon de nia lingvo al pli granda facileco. Mi plene subtenas tion . . ." (p. 2).
Bone, sed kio estas „facileco"? Por kiu, kompare al kio?
Cetere, Vilma Eichholz eraras, asertante, ke sufiĉas por esperantisto respekti nur la Fundamenton. La Fundamento estas grava elemento de la normo de Esperanto, sed ne la sola. La tuta problemo de la normo ne estas sufiĉe esplorita en Esperanto.
Kiel la aluditaj ekzemploj montras, iuj ne komprenas, ke Esperanto ne plu estas lingvoludilo, per kiu oni povas iel eksperimenti, ĝin ŝanĝi laŭplaĉe, simple enkonduki eble tian sufikson aŭ tian . . . Finfine oni komprenu, ja la lingvo fariĝis socia institucio, al kiu oni pli serioze rilatu . . .
Pro tio estas tute ne akcepteble, enkonduki en lernolibrojn personajn konceptojn kaj membakitajn afiksojn, kiel faras Vilma Eichholz. Se ĉiu agus simile, ni havus belan bukedon da „lernolibroj".
Ido suferis i. a. pro tio, ke la Ido-Akademio pli rapide akceptis novajn decidojn kaj ŝanĝojn ol la verkintoj de lernolibroj kapablis ilin enlaborigi en la „prilaboritajn" eldonojn.
Tipe ignora sinteno al gravaj problemoj mencias Vilma Eichholz: „Jam en 1981 mia edzo sendis cirkuleron al la redaktoro de „esperanto" kaj al ĉiuj estraranoj de UEA kaj atentigis pri la konstatebla ŝanĝo en la lingvouzo de UEA, temis pri ofta, sed tute malregula ellaso de la sufikso „-in", se temis pri difinita virino. Neniu respondis al li. En Akademiaj Studoj 1983, kiun ĉiu Akademiano ricevis donace de ni, mia edzo montris (p. 65), ke tiu ellaso de „-in" estas kontraŭ Fundamenta. Tamen neniu Akademiano respondis al tiu artikolo (p. 44).
Mi trovas tiun plendon prava.
Sur paĝo 45 V. S. Eichholz skribas: „La plej gravaj postuloj al planlingvo estas, ke ĝi estu malambigua, komplete regula kaj tial facile lernebla". Ĉu vere??
Mia tre pia deziro al s-ro Rüdiger Eichholz ja estas, ke li — se eble — daŭrigu la eldonon de la volumoj, sed ke li ne daŭre komencu iun novan projekton antaŭ ol estis fininta tiun, pri kiu ni jam atendas dum 20 jaroj: la Bildvortaro.

D. Blanke

Fotokonkurso

Fotokonkurson, pri la temo „Esperanto-aranĝoj" organizas: Esperanto-klubo, Parkowa 6, SDK, 28—200 Staszów, Pollando. La kondiĉo de la partopreno estas: devas esti videbla sur la fotografaĵo unu el elementoj (signifoj) de Esperanto. Formato 13 x 18 cm. Krome oni skribu la titolon. La templimo: ĝis la 30a de oktobro 1987j. La fotografaĵoj ne estos resenditaj, ili restos en la nia arkovo kaj ĉiujn (ne nur premiitaj). Oni prezentos ilin en la ekspozicio.

William Auld: Esperanta antologio, poemoj 1887 — 1981; dua eldono, reviziita kaj kompletigita; UEA, Rotterdam, 1984, 887 p., presita en Ĉina Popola Respubliko

Kadre de la jubilea kolekto „Jarcento de Esperanto" aperis tiu ĉi libro kiel n-ro 1. Pluaj verkoj sekvos, i. a. „Nova Esperanta krestomatio", „Fundamenta krestomatio", „Enziklopedio de Esperanto" kaj antologio de originala Esperanta prozo.

La nuna eldono de la poezia kolekto estas la dua. W. Auld reviziis kaj kompletigis la unuan jam aperintan en 1958.

La „poezia kolekto" estas grandioza libro. En ĝi W. Auld elektis sur ĉiuj kvin kontinentoj.

Konsiderante, ke la libro „nur" prezentas elekton el — mi certe ne troigas — miloj da poemoj, originale verkitaj en Esperanto dum la pasintaj preskaŭ 100 jaroj, oni povas prijuĝi la grandegan amplekson, kiun Esperanto atingis ankaŭ sur arta kampo. La libro, suverene aranĝita de W. Auld, pruvas diversmaniere, ke Esperanto en la poezio ne malsuperas naciajn lingvojn. La legado de diversspecaj poemoj el la tuta mondo efikas ĝojon, fieron kaj kontentiĝon samtempe.

Estas konata sperto, ke oni ne povas legi poemojn tiel flue, kiel ekz. romanojn, ĉar en poemoj la esprimitaj pensoj estas arte konstruitaj, kaj la rimita formo postulas de la leganto pli grandan atenton kaj koncentriĝon. Tio ankaŭ estas la kaŭzo, kial tiu ĉi recenzo aperas nur nun.

La nomoj de la poetoj Kalocsay, Baghy, Schwartz, Auld, Boulton aŭ Dresen ja estas konataj en Esperantujo, kaj ĉiu esperantisto scias, ke tiuj nomoj estas sinonimoj por beleco, profundeco kaj klareco de la vortoj kaj pensoj. Sed kiom da belaj poemoj montras la libro, poemoj de poetoj, kies nomoj bedaŭrinde estas sufiĉe nekonataj. Ankaŭ la poemoj mem. La libro enhavas biografiajn notojn pri ĉiuj 163 poetoj (kaj la biografioj kovras 36 paĝojn).

Tre interesa estas ankaŭ la postparolo de W. Auld. Li skribis i. a. — jam en la unua eldono —, ke „efektive ekzistas esperantista kulturo, sed ĝin ĉiam minacas disfalo pro manko de celkonscia eduka aparato". Mi ne tute samopinias, ĉar feliĉe en multaj landoj — ankaŭ ĉe ni — ekzistas multaj kursoj, kluboj kaj revuoj, kiuj sukcese celas disvastigi la esperantistan kulturon, sed mi konsentas, ke tiuj klopodoj ankoraŭ ĉiam ne sufiĉas, por efektive eduki kulture la esperantistaron. Cetere mi opinias, ke ekz. la GDR-a eldono de „Paco" konsiderinde konformas al tiu ĉi celo.

Interesa ankaŭ estas en la postparolo, kiel W. Auld klasifikas la evoluon de la esperantista poezio en „primitivan romantismon" (1887—1921), „maturan romantismon" (1921 — 1931), „parnasismon" (1931—1956) kaj „postparnasismon" (ekde 1956). Oni ne povas citi ĉi tie la argumentadon pri tiu klasifiko, ĉar tio necesigas pli vastan kadron (mi intencas, skribi pri tio eseon aliloke). Sed la libro mem pruvas la eldiron, ĉar en ĝi laŭdinde la aŭtoro ne ordigis la poemojn laŭ la nomoj de la poetoj, sed laŭ la tempo de ilia verkado. Pro tio la leganto mem povas havigi al si bonan impreson pri la evoluo de la poezia verkado.

Entute la „Esperanta antologio" estas bonega pliriĉigo sur la libromerkato en Esperantujo, valora helpilo por nia kultura laboro kaj digna kontribuo al al centjara datreveno de la ekzisto de Esperanto.

Manfred Arnold

Jan Werner: Terminologia Kurso (Manlibro eldonita por la kurso okazigata de Esperanto-rondeto de la sindikata klubo en Roudnice nad Labem kaj de la scienca-teĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1986-09-1./5. Roudnice n. L.: Sdružený klub ROH. 1986, 88 p.

La scienc-teknika revolucio kaŭzas kvazaŭ eksplode evoluantan faklingvon en la diversaj branĉoj de la scienco kaj tekniko. Ankaŭ en Esperanto la neceso de bonkvalita terminologia laboro estas senduba, kvankam la atingita nivelo de diversaj fakvortaroj kaj terminaroj ne povas kontentigi. Tro ofte verkantoj de terminaroj kredas, ke sufiĉas faka scio por produkti terminaron en Esperanto. Nu — oni certe tuj konsentos, ke krome necesas almenaŭ bona lingva scio en Esperanto, ankaŭ ne ĉiam certigita. Sed tro da terminfarantoj ignoras la fakton, ke ege gravas tria scio-kampo: oni devas koni la problemojn, principojn kaj metodojn de adekvata terminologia laboro. La fondinto de la moderna terminologio-scienco, Eugen Wüster (1898—1977) ja ankaŭ estis unu el la pioniroj de la esperantologio, kaj tamen liaj priterminologiaj verkoj estas tro nekonataj en la rondoj de Esperantaj terminologoj. Dum la lasta tempo replifortiĝis la klopodoj ne nur stimuli la terminologiajn aktivecojn sed, plej ĉefe, levi ilin sur pli altan nivelon, utiligante ekzistantajn spertojn el la Esperanto-movado kaj aparte ankaŭ tiujn de la internacia neesperanta terminologia mondo (ISO, Inforterm, TermNet). Aperis kelkaj materialoj i. a. de Jan Werner (Terminologiaj instigoj el Bad Saarow. En: Budapeŝta informilo, **14**, n-roj 2—3/1986) kaj Wera Dehler (Terminologiaj principoj de Esperanto. En: der esperantist, **21**, n-ro 132, 4/1985).

Treege grava paŝo en la direkto de plua kvalita ŝanĝo de terminologia laboro okazis per la „terminologia kurso", kiun okazigis la Scienca-Teĥnika Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio de 1a ĝis 5a de septembro 1986 en Roudnice n. L., Ĉeĥoslovakio. La aranĝo uzis la recenzatan materialon.

Sub „terminologio" Werner komprenas kun Horecký la teorion kaj metodojn pri la ellaborado de terminaroj, do ĝi estas la „scienco pri la karaktero kaj aplikado de terminoj" kaj sekve ampleksas la „teorion pri la faka parto de leksiko en kiu ajn lingvo kaj ankaŭ la sisteman ellaboron de terminaroj" (4).

La dense tajpita verko (88paĝa sed fakte kompareblas al 160 normpaĝa manuskripto) entenas la ĉapitrojn: 1. Fakaj nomoj en la leksiko, 2. Nocioj, 3. Rilatoj inter nocioj, 4. Terminoj (i. a. 4.3. Specoj de terminoj, 4.9. Proprecoj de terminoj), 5. Kvin paŝoj al

terminaro (faklimigo, determinado de la aro de nocioj, klasifiko de nocioj, nomumo de nocioj), 6. Kreado de terminoj, 7. Vortaroj, 8. Internacieco de terminologia agado, 9. Ekzemplo de serĉado de nova vorto (giso), 10. Lingvistika minimumo. Al la anekso de la broŝuro apartenas a) indekso de terminologiaj terminoj (100 terminoj kun ekvivalentoj en la lingvoj ĉeĥa, germana, germana, angla), b) glosaro de nove kaj ŝanĝite uzitaj terminoj kaj c) 44era bibliografio. Werner utiligis kelkajn de la aktualaj nacilingvaj kaj esperantistaj bazaj verkoj aŭ studoj pri terminologio kaj lerte kaj kreive kompilis la manlibron. Estas tute kompreneble, ke enestas kelkaj eraroj aŭ diskutindaj punktoj, des pli, ĉar nek la lingvistoj nek la terminologoj formas unuecan skolon. Do aŭtoro ĉiam devas elekti kaj decidi kaj neniam trovos ĉies akcepton. Pro tio sufiĉas mencii nur kelkajn iom gravajn punktojn: En la antaŭparolo oni ne citu anonimulojn, eĉ se ili — laŭ aserto — estas famaj. Prezentante la kvar funkciajn stilojn de la „literatura lingvo" (4), la „parolan stilon", kiu inkluzivas la simplan stilon de leteroj, oni nomu pli bone „ĉiutaga stilo". Anstataŭ paroli pri „literatura lingvo, kiu estas la plej alta kaj normigita lingvotavolo de la nacia lingvo (skriba kaj parola) kaj miksebla kun la beletra funkcia stilo, oni parolu pri la „alta lingvo".

Anstataŭ lingvaj planoj (5) mi preferus „lingvaj niveloj", por ne miksi kun „planlingva projekto" aŭ planlingvo. En la verko oni rimarkas konfuzan distingon inter „plursignifeco" kaj „polisemio". Ambaŭ estas identaj. Ankaŭ estas diskutinda la diferencigo inter nocio kaj signifo ĉe faka vorto. (9) Verŝajne oni povas ilin fari samenhavaj.

Sur paĝoj 21 — 23 la materialo pri internacieco en la leksiko de lingvoj ne estas de A. Bednařik sed de V. V. Akulenko. (O preodolenii jazykogo bariera en „Budušĉee nauki", Moskvo, 4/1971, p. 352 — 365). Kvankam la fonemo ĥ povas esti utila en terminoj, tamen en la materialo de J. Werner iom ĝenas la troigita uzo en vortoj (ekz. teĥniko, sĥemo, ĥemio), kie jam enradikiĝis la k-fonemo (cetere, lastatempe ofte konstateble ĉe ĉeĥaj aŭtoroj).

La libreto estas pure tajpita (cetere fare de la aŭtoro), klare strukturita (entute 163 ĉapitroj, subĉapitroj kaj ĉapitretoj) en fotoofseta preso.

Jen, nur elekto de kelkaj rimarkoj. Tamen, ili kaj certe necesaj aliaj rimarkoj neniel malgrandigas la valoron de ĉi-tiu pionira laboro, kiun faris Jan Werner. Ĝi meritas grandan atenton, respekton kaj kritikan reagon, por ke eblas prilabori la duan eldonon. La broŝuro estas mendebla ĉe la sekretario de STS-ĈEA Jiři Laube, Alej Rudé armády 811, 41301 Roudnice n. L., kiu informos pri la eblecoj de akirado. **D. Blanke**

Neue Verbandsadresse / Adreso de GDREA

Jen la nova adreso de GDREA: Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Otto-Nuschke-Straße 1, Berlin, DDR—1080 (Poŝta adreso!), Telefono 2 82 63 43.

Oficeja adreso: Friedrichstraße 120.

Stanev, Ljuben:

La glacikovrita ponto. Romano. Sofija: Sofia-Pres, 1984. 144 pagoj.

Unu jaron post la kvindeka datreveno de la fama proceso kontraŭ Georgi Dimitrov kaj kamaradoj antaŭ la Regna Tribunalo en Leipzig pro imputita bruligo de „Reichstag" (Germana Parlamentejo), kiu fariĝis la unua grava malvenko de la germana faŝismo, aperis en Sofio nova libro. La aŭtoro, konata bulgara ĵurnalisto kaj verkisto [1], rivelas en sia romano nur mallongan parton el la vivo kaj batalo de Georgi Dimitrov, nome la tempon inter fino de decembro en 1933 (la „senkulpa"-verdikto por Dimitrov, Popov kaj Tanev) kaj meze de januaro en 1934 (transporto el la Leipzig-a malliberejo al la Gestapo- arestkelo en Berlin). Sed ĝuste tiu tempo estas tiel dense plenigita je aktivecoj rilataj al la plua sorto de la tri bulgaroj. Ĉi tie mi ne intencas informi la legonton detale pri ĉiuj maĥinacioj de la naziaj potenculoj, kiuj kulminas — laŭ la aŭtoro — en atencon kontraŭ la vivoj de Dimitrov kaj kamaradoj. Mi ankaŭ ne volas raporti pri la provoj sekurigi kaj liberigi Dimitrov-on. Tion la leganto eksciu mem, des pli, ĉar la tuta romano estas verkita en tre emociiga kaj kaptiva stilo. Ne la nurajn eventojn la aŭtoro prilumas, li metas en la centron sangoplenajn karakterojn (i. a. Göring, la usonan ambasadoron Dodd kaj lian filinon Martha, provoson Kluge, lian paralizitan filinon Renata, la kuraciston Steiner ...), kies psikologiojn li tre bone ĉizas. Tio igas la romanon realisma, plastika kaj oni havas la impreson, vidi ĉion ĉi per propraj okuloj. (Cetere: eble iu el la legontoj vere jam spektis tion, ĉar laŭ la romano de Stanev estiĝis internacia televida filmo, prezentita ankaŭ de la Televido de GDR.)

La interesa enhavo, la atenton-tena stilo kaj la ĝenerale bona lingvaĵo (esceptitaj estas foje misskribitaj nomoj, kelkaj malglataĵoj kaj ĉirkau 50 facile superlegeblaj preseraroj) rekomendas la libron. Ĉar la libro en Esperanta traduko sin turnas al mondvasta legantaro, senteblas la manko de pro- respektive epilogo, kiu liveras la necesan historian kontekston (kiun bulgaroj certe kaj GDR-anoj eble ne nepre bezonas). Ankaŭ la glosaro (precipe ĉe la personoj) havindus ampleksigon.

Nun oni povus fini la recenzon, tamen necesas kelkaj pliaj vortoj. Ĉar la priskribita murdatenco al mi konatis nek el mia profesia tempo en la Leipzig-a Georgi-Dimitrov-Muzeo nek el la marksisma historia literaturo pri Dimitrov, interesis min la fontoj, el kiuj la aŭtoro ĉerpis siajn sciojn. Montriĝis, ke ekzistas nur du libroj, kiuj rilatas al konkreta murdintenco. La unua estas „La taglibro de la ambasadoro Dodd" (eltiroj, publicitaj de liaj gefiloj William E. Dodd kaj Martha Dodd). La usona ambasadoro Dodd notas, ke ĵurnalisto, kies nomon li eĉ en sia taglibro ne povas nomi, informis lin (Dodd), ke altranga germana oficisto, li (Dodd) supozas RUDOLF DIELS, . . . ktp. ktp.

Do, la unua fonto estas sufice malcerta (nenomita ĵurnalisto, nenomita germana ofi-

cisto, supozo pri Diels) kaj pro tio Dodd efektive nenion povas atesti. — La dua trovita libro estas ĝuste de tiu menciita Diels. Kiu estas tiu Rudolf Diels kaj de kie li prenis siajn sciojn?

Rudolf Diels — identa kun la romanfiguro Wolf Alexander Diks — komencis sian polican karieron kiel tiam 29jaraĝa en la Weimar-a Respubliko kiel specialisto pri „komunistaj aferoj". Sub la kancelieroj von Papen kaj Schleicher li akiris gvidan polican postenon. Göring faris la nepartianon Diels vicĉefo de la novefondita Sekreta Ŝtata Polico (Gestapo), evidente klara aprezo de la „fakaj kvalitoj" de Diels. La ardanta kaj ĉasosperta antikomunisto akiris kaj ĝuis la personan fidon de Hitler kaj Göring. En la naziinterna lukto pro la plej potencaj postenoj li montriĝas danĝera, ĉar li posedas baldaŭ dosierojn pri ĉiuj naziaj grandoj kaj provas „ludi pli ol unu karton". En 1934 li malvenkis la ludon, perdis sian postenon kaj mem fariĝis arestito de Gestapo. Post la frakaso de la faŝismo li verkis siajn rememorojn (ankaŭ li ne havas dokumentojn) sub la titolo „Lucifer ante portas" (Lucifero antaŭ la pordo). Tiu libro, aperinta en Zürich, estas la provo „persil"-blankigi la veŝton de Diels, kiu ĝuste en tiu tempo penis (cetere, vane!) akiri en FRG la prezidantecon de la novefondita „Ofico por Protekto de la Konstitucio" . . .

Ĉe Diels la afero cetere prezentiĝas iomete alie: tuj post procesa fino la SA-gvidanto Karl Ernst estus planinta atencon kontraŭ la tri bulgaroj dum la transporto de Leipzig al Berlin. Li (Diels) estus aranĝinta, ke Dimitrov estus lasita en la sekura Leipzig. Ankaŭ poste li estus sin engaĝinta por la sekura transporto al Berlin, kie Dimitrov estus ĝuinta lian protekton. Siajn intimajn konojn pri la rivaleco inter Goebbels kaj Göring li eĉ estus eluzinta ĉe Hitler por ebligi, ke Dimitrov sekure povu forlasi Germanion . . .

Tiun Diels-version la aŭtoro aliigis, aliajn partojn de la libro li transprenis. Mi persone emas kredi la „malkovrajojn" de Diels nek pri la atenco nek pri lia rolo en ĝi. La konkreta historia situacio (tutmondaj protestoj el ĉiuj socitavoloj: „Liberigu Dimitrov! Liberigu Thälmann!") kaj la sorto de Ernst Thälmann (mallibereja restado ĝis „konvena tempo" por murdo) ne konvinke subtenas la atenco-version. Sed kiel ajn: konfirmitaj faktoj ne ekzistas kaj tio donas spacon al ĉiutendencaj kaj ĉiuintencaj spekulacioj kaj legendoj.

Kun plena respekto de la aŭtora rajto, enkonduki kaj roligi flankajn personojn en romanon pri historia personeco, mi tamen kontestas lian rajton deflankiĝi — pro kia ajn motivo — de la historie esplorita kaj dokumentita vero. Mi kredas, ke la aŭtoro estis malbone konsilita, bazi sian romanon pri Dimitrov sur siaj propraj spekulacioj, kiuj fontas el la „persil"-libro de iama Gestapovicĉefo. Mi opinias, ke la vivo de Georgi Dimitrov estas plenplena je vere ekscitaj eventoj, ke elprovita kaj stile tiel sperta romanaŭtoro, kiel Stanev sendube estas, trovas materialon por pli ol unu libro.
Ĝenerale leviĝas la demando, ĉu licas teksi ĉirkaŭ historiaj personoj de ĝis hodiaŭ efikanta signifo iajn legendojn? Ni kompare rememoru pri la „Lenin-kaj-Esperanto"-legendo: ankaŭ ĝi bonintence lanĉita, ankaŭ ĝi kun nobla celo, ankaŭ ĝi ne senigita de ia „interna logiko", tamen: ne pruvebla, legendo, fikcio. Mi timas, ke leganto post ekkono de la „legendeco" dube demandos sin: Ĉu eble ankaŭ aliaj faktoj estas „nura fikcio"? Kaj tiajn dubojn nek Dimitrov, nek Lenin nek aliaj meritas! **J. Hamann**

[1] En GDR aperis el lia plumo: Das Mädchen aus der Provinz. Berlin: Verlag Volk und Welt, 1982: Die Schuld. Berlin: Verlag Volk und Welt, 1979 kaj 1982.

„Juna amiko" — ekde 1987 kvarfoje jare!

AMIKO POR ĈIU SEZONO!

Nova ofteco!

Kun ĝojo ni anoncas la aperon de la porlerneja revuo Juna amiko ne tri-foje en la jaro, sed kvar-foje. Ĝi respektos la pedagogian principon, „po malmulte, sed ofte kaj ripete", kiu aparte validas ĉe la pli junaj legantoj, kiun la gazeto celas.

Kiun ĝi celas?

Juna amiko celas lernantojn de Esperanto inter la aĝoj de ĉirkaŭ ok kaj dek kvin, sed komencantoj en la lingvo de ĉiuj aĝoj povos kun ĝuo kaj profito ĝin legi. Kvankam ĝi ne estas lernolibro, ĝi estas pretigita tiel, ke instruisto povos ĝin utiligi ene de lernejaj klasoj aŭ en klubaj stud-rondoj.

Kion ĝi celas?

Ĝi celas veran kaj maksimuman internacie-con, ĝi celas viglecon kaj varion, ĝi celas amuzi dum ĝi instruas. Ĝi celas esti podio por la verkajoj de legantoj.

Kion ĝi enhavas?

Vi trovos artikolojn, foje sed ne ĉiam pri la Esperanto-movado, vi trovos amuzajn rakontojn, skeĉojn kaj teatraĵetojn por aktorado, kantojn kun muzik-notoj por kanti, poemojn, konkursojn, enigmojn, leterojn de legantoj, ludojn . . . ĉion en simpla lingvaĵo ene de vort-trezoro de 700 vortoj.

Krome vi ĝuos la desegnaĵojn de Pavel Rak, kaj multajn aliajn du-kolorajn ilustrajojn.

Kiu ĝin redaktos?

Samtempe kun la ŝanĝo de ofteco estas ŝanĝo de redaktoro: 38-jara instruisto el novzelandano, Stefan MacGill, nun loĝanta en Budapeŝto. Tiu dum multaj jaroj akupiĝis pri la revuo Kontakto kaj per tio havas sperton pri verkado per limigita vort-trezoro kaj teknika redaktado. En la revuo regule aperos amuzaj skeĉoj kaj rakontoj de lia plumo.

En GDR: La revuo estas oficiale abonebla en GDR pere de Post- und Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb des PZV, Übigauer Straße 4, Falkenberg 7900, prezo: 9,30 M., mend.-n-ro: Z0230—1318.

Bulgario

Profesoro de franca lingvo, 30j., dez. kor. pri junulara vivo, GDR: Lubomir Kosev, str. Rodopi 22, **7300 Kubrat**

Profesoro de fiziko, 25j., dez. kor. kun gekolegoj pri reciproka gastado, junularaj temoj: Emil Šterev Naúmov, str. Drava 5A, **7300 Kubrat**

10j. lernantino dez. kor. kun samaĝuloj pri literaturo, turismo, sporto, filmoj: Rozalia Georgieva Ermenkova, J. K. Zona 6—5—1, bl. 2, et. 9, ap. 101, **Sofio**

11j. lernantino dez. kor. kun samaĝuloj pri literaturo, turismo, sporto, filmoj: Lena Nikolova Borisova, J. K. Zona 6—5—1; blok 2, et. 9, ap. 100, **Sofio**

Komencantino dez. kor.: Jordanka Porteva, **1407 Sofio,** str. Trepetlika 25, bl. 9, vh. 1

Lernanto de la 6a klaso dez. kor. kun germana amiko: Biser, Damianov Sahatĉiev, str. „Trakija" 14, **Gorna Orjahovica**

Lernantino de la 3a klaso dez. kor.: Jivka Jivkova, „Br. Miladinovi" 82, **Varna**

Ĉinio

Dancisto, 26j., dez. kor. tutmonde kun gejunuloj pri dancnovajoj, muziko, kulturo k. a., kol. magazinoj, fotoj, bk, pm: Zhang Xiao Yu, Roushi-Xiang 5, **Neijang, Sichuan-provinco, 641 000**

ĈSSR

Oficistino, 31j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Hana Škeříková, Štitného 20, 394 70 **Kamenice nad Lipou**

Francio

Max Lainé, „Bellevue", **72470 Champagné,** dez. kor. kun membroj de GDREA

GDR

Norbert Krämer, Bahnhofstr. 52, **Apolda 5320,** dez. kor. tutmonde pri muziko, sporto, E-movado

19j. fraŭlino dez. kor. tutmonde pri muziko, vojaĝoj, E-movado: Nancy Matern, Vinetastr. 62, **Berlin 1100**

48j. konstruinĝeniero dez. kor. tutmonde: Egon Karwoth, Forster Str. 108, **Cottbus DDR-7500**

Studentino, 23j., dez. kor. tutmonde pri sporto, vojaĝoj, literaturo, filmo, lingvoj, kol. bk: Uta Bergmann, Wilhelm-Pieck-Ring 31, **Kölleda 5234**

Dez. kor. k. interŝ. bk: Ulrich Bechtloff bei Seidel, Kietzstr. 20, **Dyrotz- Nauen 1551**

Georg Martin, Str. d. Befreiung 82, **Berlin 1136,** dez. kor. tutmonde pri agrikulturo, naturo, pacmovado, vidindaĵoj

Hungario

12j. lernanto dez. kor. kun samaĝaj lernantoj p. ĉ. t.: Zoltán Szabó, **Mezöhegyes,** Čokonai u. 18 sz. **5820**

Irano

Juna esperantisto dez. kor.: Hasan Asadpur, P. O. **51335—1957, Tabriz**

Kubo

José Manuel Hirola Sosa, Herrera 369, ap. E Melones y Rosa Enrriquez. **Ciudad de la Habana,** 24j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Pollando

Stanislav Debski, str. Glowna 55, **97—122 Rozyca,** (22j.), dez. kor. pri literaturo, filozofio, fotografio, turismo.

Laboristo, 28j., dez. kor. kun geesp. el GDR p. ĉ. t., kol. bk: Bogusław Urbaniak, ul. Kościuszki 7, **42—620 Nakło SL**

Laboristo, 26j., dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, folkloro, kol. pm, bk: Krzysztof Biesaga, Pl. Wolności 25/5, **58—200 Dzierżoniów**

Instruisto, 38j., dez. kor. tutmonde pri lingvoj, turismo k. a.: Kazimierz, Nosul ul. Warszawska 67/35, **16—201 Białystok**

56j. em. dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Maria Pruchniak, ul. Świdnicka 56/3, **58—200 Dzierżoniów**

Komencantino, 47j., em. dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Józefa Rudkowska, Osiedle Kolorowe 20B/15, **58—200 Dzierżoniów**

Anoj de E-klubo ĉe Urba Kultura Centro en Gniezno dez. kor. (individue aŭ komune) tutmonde: MOK (Esperanto-klubo) str. Marchlewskiego 11, **62—200 Gniezno**

Komencanto, 24j., dez. kor. tutmonde pri sporto, muziko, kol. sondiskojn: Boguslaw Nitecki, **87—600 Lipno,** Kilińskiego 3 m. 2

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Otto-Nuschke-Str. 1
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16